

# Esperanto en Skotlando

*Esperanto in Scotland - Esperanto ann an Alba*  
*Vintro 2008/2009 - £2/€2.50*



**Jean J. Bisset: Neil M. Gunn (1891-1973)**

**John Francis: *La Faktora Rakonto***

Ankaŭ en ĉi tiu numero : Arĥip Teslenko : “Ĉe Ermito” tradukita de Viktor Pajuk : Garbhan MacAoidh: “La unika karaktero de la esperanta lingvo” : Norah Brown (1928-2008) : Garbhan MacAoidh: Recenzo: “Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto” de Geoffrey Sutton : Andrew Weir: “Naciismo, internaciismo, sennaciismo” : KAJ MULTO ALIA ....

# Esperanto en Skotlando

Numero 197 - Vintro 2008/2009 - ISSN 0014-0643

**Redaktoro:** Ed Robertson  
**Helpredaktoro:** David Kelso  
**Administranto:** Mia Casey

**Redakcia adreso:** 52 Easter Drylaw  
View, Edinburgh, EH4 2QP  
**Telefono:** 0131 332 9803  
**Rete:** ed-robertson@telesvet.co.uk

La redakcio bonvenigas kontribuojn ĉiaspecajn: artikolojn, novelojn, novaĵojn, recenzojn, poemojn, leterojn, ktp. Limdato por la venonta kajero de **Esperanto en Skotlando**: 14a de februaro 2009. Oni prefere sendu kontribuojn elektronike kiel simplan tekston aŭ uzante la formaton OpenOffice.org Writer (senpage havebla de la koncerna retejo). Dokumentoj en la formato Microsoft Word ankaŭ estos akceptataj. **Esperanto en Skotlando** uzas la tiparon Gentium, kiu subtenas kaj la tradiciajn esperantajn diakritojn kaj tiujn de ĉiu alia latinalfabela skribsistemo (vizitu <http://scripts.sil.org/Gentium> por deŝuti la tiparon). Se la formato aŭ tiparo uzata en via kontribuo ne subtenas ĉapelitajn literojn, diversaj surogataj sistemoj estas akcepteblaj. **Esperanto en Skotlando** aperas dufoje en la jaro.

## Enhavo

Arhip TESLENKO: <b>Ĉe Ermito</b> , tradukita de Viktor PAJUK .....	4
LA 104a SKOTLANDA KONGRESO DE ESPERANTO, DUNDEE / ALIĜILO .....	9
Kongresraportoj: Inverness 2008, Dunblane 2008 .....	11
Garbhan MacAOIDH: La unika karaktero de la esperanta lingvo .....	13
Jean J. BISSET: Neil M. Gunn (1891-1973) – Laŭdinda skota aŭtoro .....	20
Neil M. GUNN: <b>La Faktora Rakonto</b> tradukita de John FRANCIS .....	24
El la redakcia rubujo .....	27
Paul COSTELLO / David KELSO: Norah Brown (1928-2008) .....	31
Recenzo: Garbhan MacAOIDH pri la <b>Conciza Enciklopedio de Originala Literatura en Esperanto</b> de Geoffrey SUTTON .....	39
Poezia Angulo: Tamara DANZ <b>Kie vi?</b> tradukita de Ed Robertson .....	40
Andrew WEIR: Naciismo, internaciismo, sennaciismo .....	41

La opinioj esprimitaj en **Esperanto en Skotlando** ne nepre kongruas kun tiuj de **Esperanto en Skotlando** aŭ EAS. **Esperanto en Skotlando** estas publikaĵo de la

## Esperanto-Asocio de Skotlando

**Prezidanto:** Andrew Weir  
**Vic-Prezidanto:** Ed Robertson  
**Sekretario:** David Bisset  
**Kasisto:** David Hannah

**Adreso:** 47 Airbles Crescent,  
Motherwell, ML1 3AP.  
**Telefono:** 01698 263 199  
**Rete:** secretary@skotlando.org

# El katedro



Redaktora Komento

## La politikaj konsekvencoj de lingva malemo

*“Tom Newsome ... parolas 4 diversajn lingvojn, io, kio kredeble faras lin unika inter britaj Ministroj pri Eksterlandaj Aferoj; la plejmulto el tiuj eĉ ne scipovas la anglan ...”*

- El la fikcia televiddramo *“A Very British Coup”* (“Tre brita ŝtatrenverso”, Chris Mullin/Alan Plater, Channel 4, 1988)

Se oni rigardus nur britajn novaĵ-bultenojn, oni ricevus tre limigitan bildon de la mondo. Malofte ni aŭdas pri eventoj en “fremdaj” landoj krom se io vere grava okazas, kaj interese estas, ke eĉ tiam, malsamaj landaj ricevas malsaman traktadon. La ĉi-somera aviadil-tragedio en Hispanio, apuda lando kiun multe da britoj vizitas, ricevis atenton en la novaĵ-bultenoj, kun individuaj historioj pri trafitaj familioj. Tagojn pli poste okazis simila tragedio en Kirgizio, mortigante vojaĝuntojn al Irano. Sed tiu evento apenaŭ ricevis mencion. Ĵurnalisma pigreco? Pli ol, ĉu ne?

Same pri la ĉi-jaraj uraganoj en Karibio. Se estas minacataj usonanoj, konvene kiaj ni, la temo estas konstante kovrata. Se ja mortas aŭ senhejmiĝas malriĉuloj en Haitio, aŭ temas pri homoj el lando oficiale neaprobata, ekzemple Kubo, ni ricevas nur kurtegan klipon (krom se uzeblus io por kritiki la tiean registaron, kompreneble). Iuj homoj, ŝajne, estas konsiderataj malpli homaj ol aliaj. Precipe se ili ne parolas la anglan.

Kaj same la informoj kiujn ni ricevis pri la kaŭkazia milito en aŭgusto 2008. Sendube, kiel en ĉiuj militoj, malbonaj aferoj okazis ambaŭflanke, sed al ni prezentiĝis nur unu vidpunkto: tiu de la orlanga anglaparolanta prezidento de Kartvelio, Saak'aŝvili. Forgesiĝis la faktoj, ke lia registaro ekis la militon, kaj ke la plejmulto el la mortintoj kaj vunditoj estis osetoj. Kaj kio pri “nia” Ministro pri Eksterlandaj Aferoj, David Miliband? Evidente, Tom Newsome estis neebla fikciaĵo, kaj la karikaturo ja pravas. Miliband ne nur papagis laŭvorte la “analizon” de siaj usonaj mastroj (por ili temas pri *Georgia*, ĉu ne?), sed dume, li ankaŭ erare diris *substantive* anstataŭ *substantial*. Kiel multaj kiu nemerite provas impresi.

**Ed ROBERTSON**

# Ĉe Ermito

*Arĥip TESLENKO (1882-1911) estas unu el la plej tragikaj personoj en la ukraina literaturo, kiu opiniis, ke pasigi suferatan vivon estas protesto kontraŭ sociala kaj nacia maljusteco.*

Bela printempa mateno. Buklaj monaĥejaj akacioj ĵus ekfloris kaj odoris forte. Zumis abeloj, pepis birdaro. De malantaŭ preĝejo varmigis suno. Verda herbo. Blankaj padoj. Tien kaj reen vagis homoj, iuj en preĝejon, iuj al ermito.

En vestiblo de ermito ili plenplenis. Atendadis... Iuj sidis sur divaneto – interbabilis, “kiel aliri al li”. Iuj staris kaj ĝemis – memorante pekojn. Maljunulo kun kruco surbruste fingre montris “La Lastan Juĝon”, kiu pendis surmure. Vaganto hartufa, kun karoa aso sur ĉifona griza halato, legis al li pri pekoj, skribitaj sur serpento. Blondeta knabino en bastoŝuoj atente rigardis anĝelon kun lipharoj, blovigantan incensilon sur alia bildo. Viro kun pipo en poŝo rigardis alian anĝelon, kiu ferminte okulojn montris ĉielen al viro kun ŝvelaĵo subokule. En anguleto ĉe pordo staris maljunulino, nudpieda, en disŝirita ĵaketo. Ŝi subtenis permane palan sulkitan vangon kaj ploretis – tiel malĝoje, larmoj kiel pizo rulis ĉe ŝi.

Malfermiĝas pordo. Eniras monaĥo kun ruĝa barbo. Li havas tre kolerajn okulojn.

– Hej, vi, – ekkriis la monaĥo.

Ĉiuj turnis sin al li.

– Eniru! – montras al malfermita pordo. – Sed ne trairu... staru ĉe la sojlo.

Ili ektusetas, viŝas sin per tuketoj.

– Ne bruu, kampuloj! – kriis denove.

Ili eniris, amasiĝis ĉe la sojlo.

La pastro-ermito ankoraŭ ne venis. Nur legpupitro staris meze de la ĉambro, kovrita per flava velveto. Sur la pupitro kuŝis kune – tiel proksime unu al alia – amaso da mono, poste malgranda evangelio orumita kaj kruco kun krucumita Savanto. Dekstre de la legpupitro staris seĝo, poste – tablo sternita per tuko. Sur la tablo estis telereto da akvo, kuŝis paperfolioj laŭlonge kaj transe. Unu foliaro surtable kuŝis sur seĝo starigita tien. Sur muro malantaŭe ĉio tio pendis granda ikono de la krucumita Savanto. Dekstre de la krucumito pendis ikono de nekruumita Savanto. Poste – dipatrino kun bebo kaj fermitaj okuloj. Denove – dipatrino kun sabroj sur la brusto, ikonostazo kun ikonetoj. Antaŭ la ikonostazo brulis lampeto. Plue, sur alia muro, pendis krucumita monaĥo. Sur manplatoj de la monaĥo brulis lumigiloj, super la kapo flugis dispirito kaj sur la frunto estis skribite “Mi suferas pro la homaro”. Maldekstre de la krucumita Savanto pendis denove Savanto kun ŝafino surŝultre, denove dipatrino kun bebo, plue sanktuloj: Serafim el Sarov, Flor-asketo, Eŭtiĥ-centestro, Klaŭdio-migrulo, “La Terura Juĝo”. Oleo tre odoris.

Post iom da tempo eniris la pastro-ermito – malgranda griza maljunulo. Sur la ronda ventro de la pastro-ermito pendis blua tuko velura. Sur liaj ŝultroj kaj iom kliniĝinta dorso – nigraj strioj kun blankaj krucoj kaj diversaj vortoj. Sur la kapo brilis kalvaĵo.

La homoj klinis sin antaŭ li.

La pastro-ermito rigardis ilin iel lace, rigardis la krucumitan monaĥon, ekĝemis, poste krucsignis sin, ekkriis “Ripetu post mi!” kaj komencis:

- “Mi konfesas al Di-sinjoro...”
- Ne amasiĝu, porkuloj! – aŭdeblas de vestiblo voĉo de iu monaĥo.
- “Kaj al Virgulino-Dipatrino... kaj ĉiuj sanktuloj.”
- Nu, porkuloj!.. Fi! – aŭdiĝas.
- “Kaj al vi, Patro...”- legas la ermito.

Traleĝinte, li sidis sur la seĝo inter la legpupitro kaj la tablo kaj:

- Do, nun,- li diras,- aliru al mi unuope.

Homoj aliras, kliniĝas antaŭ li, flustras al li siajn pekojn.

La ermito krucsignas ilin:

- Mi pardonas kaj senkulpigas,- li diras.

Ili rampas por kisi lian manon. La pastro-ermito al iu donas, al alia – ne.

Tiregas la manon, kunsulkigas la buklajn brovojn.

- Ne necesas!- ekkrias.
- Vidu,- flustras homoj,- li scias, kiu indas kion!

Poste la pastro-ermito trempas fingrojn en telereto, ne rigardante eltiras paperfolion el amaso: el jen unu foliaro, jen alia, jen el subtablo.

- Vidu,- denove flustras homoj,- li scias, kiu kian “benon” meritas!

Poste la pastro-ermito montras – dekomence perkape, poste permane – monamason.

Jen la nudpieda maljunulino proksimiĝas – tiu, kiu ploris en vestiblo. Genuiĝis antaŭ li, multfoje klinas kapon al planko, kaj tiel sincere, respektoplene.

La pastro-ermito tuŝas ŝian kapon per la antaŭtuko.

- Pli rapide,- li diras,- pli rapide!

La maljunulino ekstaras, volas ion diri al li, sed ne elbuŝigas, nur movas lipojn.

La pastro-ermito ekrigardas lupe.

- Nu, kion?- demandas.
- Ho, paĉjo!
- Nu!
- Filo... dudekjara!.. Mi volis lin edzigi... Li kuŝas, ne staras.

La pastro oscedis.

- Oni bategis lin en policejo,- ploras la maljunulino.
- Do, li meritis,- la pastro al ŝi.

- Ho, Dio!.. Ĉu?.. Li nur diris al policano: “Forestas,- li diras,- la justeco en la mondo: iu laboregas, sed malsatas, alia fingron ne movas, sed vivas prospere”.

La pufaj vangoj de la pastro-ermito tuj ruĝiis. Liaj okuloj ofte ekpalpebrumis kaj:

- Silentu!- ekkriis.
- Dio mia!.. Li ja, filo mia, tio okazis je Savanto-festo...” Jen Savanto,- la filo diras,-instruas...”
- Silentu!- la ermito interrompis la maljunulinon.

Li rigardis ŝin rabobeste kaj:

- Eksterleĝuloj... Ili turnas sin al Savanto! Ili havas aferon al la Savanto... Bestuloj!
- Dio mia,- ŝi al li,- ma ja scias nenion.
- Scii vi ne bezonas. Jen sidas tiuj, kiuj scias,- la ermito direktas ŝin al “La Lasta Juĝo,- per lango - kaj en fajron!- li ekkriis.
- Dio savu min de tio,- krucsignis sin la maljunulino.- Sed interalie... pastro!.. Li restis mia sola infano. Kaj la plej juna, kaj tiom saĝa, filo mia, alfabetulo... Dio mia! Estis sepopo de pli maljunaj, sed ĉiuj transmondiĝis... kun paĉjo... Malbono enterigis ilin: haveblis nek manĝaĵo, nek vestaĵo...
- Ne parolaĉu!- denove ekkriis la pastro-ermito.-Necesas preĝi al Dio, mendi diservon!

La pastro-ermito turnis sin al foliaro. La maljunulino metis tri kopekojn sur lian monamaseton

Ŝi prenis paperfolion de li, rulas ĝin.

La ermito montras al ŝi la monamason.

- Dankon, paĉjo,- la maljunulino al li,- mi havas iom da.., homoj pruntedonis.
- Ne,- la ermito al ŝi,- ĉu vi metis tien ĉi?
- Metis, pastro.

Malrapide la maljunulino foriris korten, apogis sin al tilio kaj:

– Filo mia, filo...– ŝi ploras.

Aliras al ŝi la vagulo kun karoa aso, etendas la manon al la folio.

- Nu, kio estas ene?– li demandas. Malrulas la folion.
- “Animsava parolo al ortodoksaj kristanoj,– li legas,– Ho, gento homa!– li plulegas.– Kiel granda, kiel terura peko estas ekdeziri havaĵon de proksimulo! Ĝi estas peko nepardonebla en ĉi vivo, nek transmonde. Ĝi estas grincado denta, geheno fajra!”
- Dio mia!– ploras la maljunulino,– estu al li, filo mia, io por manĝi. Estu ne nur tiu pano seka...
- “Kion Dio donis al vi, tion kontente akceptu. Tio estas Lia volo sankta. Li, sanktulo, scias, al kiu kion...”– plulegas la karoa aso.
- Ho, savu min! Ho, kion fari? Ho, filo mia! – la maljunulino preskaŭ rompas fingrojn.
- Nu, kial vi ploraĉas? – demandas monaĥo el vestiblo.– Iru preĝi. Jen oni enlistigas por diserva mendo!

Ekvagus la maljunulino.

Ĝemis granda sonorilo...

Elukrainigis Viktor PAJUK

🏰 **Ĉu vi vidis nian TTT-ejon?** 🏰

Por la plej lastaj novaĵoj pri Esperanto  
en Skotlando kaj ĉirkaŭ la mondo

Direktu vian krozilon al:

\*\*\*\*\* NOTU LA NOVAN ADRESON!!! \*\*\*\*\*

<http://www.skotlando.org.uk>



# 104a Skotlanda Kongreso de Esperanto

Queen's Hotel, Nethergate, Dundee, 5-7 junio 2009

## ALIĜILO

Nomo	
Adreso	
Telefono	
Retadreso	

Aliĝo		
Aŭ elektu suban:		✓
Tutsemajnfina aliĝo ( <i>inkluzivas vinon kaj manĝaĵetojn vendredon vespere, lunĉon sabate kaj dimanĉe, kaj teoj kaj kafoj</i> )	£40 / €40*	
aŭ elektu unu aŭ pli el la subaj:		
Unutaga aliĝo – vendredon vespere ( <i>inkluzivas vinon kaj manĝaĵetojn</i> )	£8 / €10	
Unutaga aliĝo – sabaton matene ( <i>inkluzivas teon/kafon kaj lunĉon</i> )	£16 / €20	
Unutaga aliĝo – dimanĉon tuttage ( <i>inkluzivas teon/kafon kaj lunĉon</i> )	£16 / €20	
Kromaĵoj – elektu laŭplaĉe:		
Ekskurso al vinfarejo <i>Cairn o' Mohr</i> ( <i>sabaton posttagmeze, inkluzivas vingustumadon kaj manĝaĵetojn</i> )	£20 / €25	
Bankedo en kongresa hotelo ( <i>sabaton vespere</i> )	£20 / €25	
Donaco al Esperanto-Asocio de Skotlando ( <i>skribu laŭdezire:</i> )		
Entute mi pagas ( <i>skribu:</i> )		

\* Speciala oferto por tiuj kiuj venos de ekster Britio - rabato dum/se la kurzo eltenos!

# 104a Skotlanda Kongreso de Esperanto

Dundee, 5-7 junio 2009

## ALIGILO (daŭrigo)

Tiuj, kiuj havas malpli ol 26 jaroj kiam aliĝante, povas ricevi subvencion de la fondaĵo NoJEF, kiu ekzistas por kuraĝigi junajn esperantistojn ĉeesti Esperanto-aranĝojn. Sinprezentadoj de junaj esperantistoj de ekster Britio estas speciale bonvenaj. Bonvolu kontakti la NoJEF-sekretarion por pli da detaloj: *David Kelso, 5 Craighill Road, Kilncadzow, Carlisle ML8 4QT, Britio; [davidekelso@yahoo.co.uk](mailto:davidekelso@yahoo.co.uk)*

Ni akceptas pagon per ĉeko, en britaj pundoj pagenda al “Scottish Esperanto Association”; aŭ per pago al UEA-konto **eask-l**.

<b>Mi pagas:</b> (forstreku la netaŭgan)	per ĉeko / per pago al UEA-konto
<b>Ĉu vi estas vegetarano?</b> (forstreku la netaŭgan)	Jes / Ne

Resendu formularon kun pago, preferinde antaŭ la 1-a de aprilo 2009, al la organizanto:

<b>Andrew Weir, 2 Hill Street, Broughty Ferry, Dundee DD5 2JL, Britio.</b>
<b>Poŝtelefono: +44 (0) 7963 430109;</b>
<b>Retadreso: <a href="mailto:andrew.w.weir@googlemail.com">andrew.w.weir@googlemail.com</a></b>

Se vi havas iujn pluajn demandojn, bonvolu kontakti la organizanton per la supraj detaloj.

# Kongrese Invernese

La 103a Skotlanda Kongreso de Esperanto dumlonge estis planita okazi en la nord-altlanda vilaĝo Invershin. Malmultajn semajnojn antaŭ la organizita evento, la posedantoj de nia unta kongres-hotelo vendis la ejon, kaj nuligis do nian mendon. Tamen, dank' al la streboj de nia tiama prezidanto David Hannah, nia kongreso rapide rearanĝiĝis en la ĉefurbo de la skota altlando, Inverness.

Kiel kutime, la partoprenintoj venis ne nur de Skotlando, sed ĉi-foje ankaŭ de Anglio, Irlando, Kimrio kaj Germanio, kaj ili ĝuis buntan programon de prelegoj (interalie pri la skotgaela kaj pikta lingvoj, pri la altlandaj fervojoj, pri la aŭtoro Neil Gunn [*ndlr: vidu aliloke en ĉi numero*], kaj la teoriaj bazoj de kelta muziko), ekskurson norden al Dunrobin-Kastelo, sidejo de la duko de Sutherland (kies praulo, la unua duko de Sutherland, George Granville Leveson-Gower, respondecis pri brutala forpelado de malriĉaj bienuloj inter 1811 kaj 1820), kaj gvidatan promenadon kaj ĝuindan bankedon en la Eagle-Hotelo en la interesa urbeto Dornoch.



**Falko flugas preter Jack Casey dum  
demonstro de ĉasbirdoj ĉe Dunrobin**

# Lude/stude ĉe Dunblane

Nia gastpreleganto en Dunblane en septembro estis John Wells, emerita profesoro pri fonetiko ĉe University College London. John faris intereseĝan prelegon pri la karibia insulo Montserrat, kaj du lingvo-seminariojn. Dume Hugh Reid gvidis lecionojn por komencantoj.



La eksteraj distraĵoj komenciĝis frue per vizito al la apuda urbeto Bridge of Allen por vidi la meblojn kaj ornaman ekranon kiujn desegnis la arkitekto Charles Rennie Mackintosh por la tiea preĝejo. Poste al loka bierfarejo por lerni de la posedanto pri la bieroj faritaj tie – kun diversaj provspecimenoj, kaj poste lunĉo de supo kaj sandviĉoj. Aliaj eroj en la programo estis kvizoj pri etimologio kaj vortaro-difinoj, kaj diskuto enkondukita de Andrew Weir pri “Naciismo, sennaciismo kaj internaciismo”, reproduktita aliloke en ĉi tiu numero.



# La unika karaktero de la esperanta lingvo

*Prelego por la Zamenhof-tago en Edinburgo, la unuan de decembro 2007*

Iam mi legis artikolon en kiu la aŭtoro asertis, ke Esperanto estas la plej nova el la latinidaj lingvoj. Se ni rigardas ĝin el la vidpunkto de nura vortaro, ĝi vere aspektas tre latina. Se mi bone memoras, oni kalkulas, ke proksimume 65 procento de ĝia vortaro devenas rekte de latino aŭ de iu ajn el la latinidaj lingvoj. Tio kompareblas kun aliaj lingvoj, kiujn ni rigardas kiel origine latinajn, ekzemple la rumana, kies vortaro enhavas multajn slavdevenajn radikojn, kaj la hispana kaj la portugala, kies vortaroj montras fortan influon de la maŭra araba. En tiu senco, do, Esperanto estas nek malpli, nek pli latina ol tiuj lingvoj. Tamen, laŭ aliaj aspektoj, la zamenhofa lingvo estas tute unika, kaj poste mi donos kelkajn ekzemplojn de ĝiaj unikajoj.

Unue, lasu nin faru komparon inter la strukturo de tipa latinida lingvo, nome la hispana, kaj Esperanto. Tia komparo montros, ke *filozofie*, Esperanto estas malsama al aliaj supraĵe similaj lingvoj. Kiel ekzemplo ni prenu la hispanan frazon *La mano blanca* aŭ, se oni volas emfazi la adjektivon: *La blanca mano*. Ekzakte sama, krom pri la uzo de la litero *k* anstataŭ la *c* en la adjektivo, estas la esperanta frazo. Sed, analizante la hispanan, ni observas, ke la artikolo *la* uziĝas pro la fakto, ke *mano* estas ingenra; la substantivo *mano* escepte finiĝas per *-o*, kiu normale estas virgenra finaĵo; kaj la adjektivo finiĝas per *-a*, ĉar tiu estas la ingenra finaĵo por substantivoj kaj adjektivoj.

La esperanta frazo havas ekzakte la saman artikolon kaj finaĵojn, sed pro tute malsamaj kaj multe pli logikaj kialoj, nome, ke la artikolo en Esperanto ĉiam estas *la*; ĉiuj adjektivoj finiĝas per *-a*; kaj ĉiuj substantivoj finiĝas per *-o*. Tio estas ekzemplo de iu, kiun Claude Piron nomas *le principe de l'assimilation généralisatrice* ('la principo de ĝeneraliganta asimilado'). Tre junaj infanoj, kiu laŭŝajne naskiĝas kun nature logika sento, kiu bedaŭrinde malaperas kiam la homo estas plenkreska, ne diras *men* kiel pluralo de *man* sed "mans". Anstataŭ *I ate* ili diras *I eated*. Unu el

niaj filoj, kiam li estis eta knabeto, diradis *One tortoi, two tortoise*. Simile kaj konsekvenca logika estas nia Esperanto.

Sed Esperanto ne nur estas logika. Ĝi ankaŭ estas facile lernebla kompare kun aliaj lingvoj. Certe ni ne devas troigi ĉi tiun punkton kiam ni faras reklamon por Esperanto. *Neniu* lingvo estas facila. Tamen, oni multe pli rapide lernos ĝin ol iun ajn nacian lingvon. Tio validas precipe por homoj, kiuj konas iun eŭropan lingvon, sed ne nur tiuj. Dum la nacia kongreso de la Skota Esperanto-Asocio en Lanark, mi havis okazon konversacii kun profesorino Gong Xiaofeng el Ĉinio, kaj ŝi menciis, ke kvankam ŝi studis la anglan lingvon ekde siaj lernejaraj jaroj, por ŝi Esperanto estas multe pli facila ol la angla. Pri ĝia facileco por ni eŭropanoj, mi ŝatus aludi al iu ege interesa artikolo de W.E. Collinson: *The Internationality of some Esperanto affixes*, kiu aperis en Volumo 1, N-ro 2 de la revuo *Esperantologio* en la jaro 1950. La aŭtoro montras, ke la plimulto da esperantaj afiksoj “havas rimarkindan gamon de internacieco kun punktoj de rilato kun pluraj heterogenaj lingvoj”. Li aldonas: “tiaj afiksoj donas valoran mnemonikan helpon al parolantoj de multaj etnaj idiomoj”. Kaj tio veras ne nur ĉe la afiksoj. Multege da aliaj esperantaj radikoj estas facile lerneblaj, ĉar ili estas komunaj al multaj lingvoj, aŭ memorigas la lernanton pri similaj vortoj aŭ konceptoj en sia nacia lingvo. Mi citu nur tri ekzemplojn el grandega nombro: *kapo*, *maro*, *patro* La radiko *kap’* (el Lat. *caput*) troviĝas en, aŭ memorigas pri: G. *Kopf*; Gr. *kephali*; Ned. *kop*; R. (kaj aliaj lingvoj) *Kapitan*; Angl. *capitation*, *cape*, *ktp*, Fr. *décapitation*; Hisp. *Cabeza*, *ktp*, *ktp*. – do, fakte ni trovas tiun radikon en ĉiu eŭropa lingvo de hindeŭropa deveno. Simile, la esperanta vorto *maro* elvokas *mer*, *mar*, *mor*, *muir*, *maritime*, *marine*, *mare*, *more*, *morze*, al parolantoj de, respektive, la franca, hispana, kimra, gaela, angla, itala, rusa, kaj pola. Radikoj similaj al la esperanta vorto *patro* troviĝas en preskaŭ ĉiuj eŭropaj lingvoj. Ne necesas citi pli da ekzemploj de tiu trajto.

Eble ne tiom ofte rimarkita estas la fakto, ke Esperanto estas unike humura lingvo. Kredeble neniu alia idiomo ofertas tiom da ebleco por vortludo kaj ŝerco. Tiu karakterizaĵo estis riĉe ekspluatita de verkistoj kiel Julio Baghy, Lorjac, Reto Rossetti kaj Louis Beaucaire, sed precipe de Raymond Schwarz. Se restos tempo, mi citos ekzemplon el la verkaro de la lasta.

Plie, Esperanto estas verŝajne la sola lingvo, kiu ebligas, ke oni tuj komprenu, sen helpo de vortaro, vortojn, kiuj oni neniam antaŭe vidis;

plie, kiu permesas, ke oni inventu kunmetaĵojn neniam uzitaj de aliaj homoj, kondiĉe, kompreneble, ke oni sekvu la regulojn de vortformado establitaj en la Fundamento. Kiam okazis la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer, la kongresanoj miris, ke ili, el kiuj la plimulto neniam havis okazon interŝanĝi eĉ unu vorton de Esperanto kun alia homo, povis kompreni kaj esti komprenata. Simile, ni konstatas en la Esperanto-Asocio de Irlando, ke aro da junuloj, kiuj lastatempe aliĝis al nia dublina grupo post lernado pere de la interreto, sen persona kontakto, sufiĉe flue parolas kaj havis bonan prononcon. Mi dubas, ĉu oni havus similan sperton ĉe lernantoj de alia lingvo.

Iutage, dum vizito kun eksterlanda esperantisto al arkeologejo en Irlando, ni renkontis viron, kiu demandis en kia lingvo ni konversacias. Ni respondis, 'Esperanto', kaj li komentis, ke ĝi tre similas la hispanan aŭ la italan. Oni rememoru, ke Zamenhof mem rekomendis, ke oni prononcu Esperanton kiel la itala aŭ la latina.

Tamen, eĉ li ne tute konsenkvence sekvis tiun rekomendon. Mi ĵus uzis la vorton 'konsekvence', en kiu la latina *-qu-* en *consequentia* iĝas *-kv-*. Simile, la esperanta inkludas vortojn kiel *kvadrato*, *lingvo*, *Urugvajo*, en kiuj originala *u* post *k* estis ŝanĝita al *v*. La kialo estas evidenta: en Norda Eŭropo – precipe en la rusa kaj la germana lingvoj, en kiuj Zamenhof estis edukita, tiu estas la normala prononco de tiaj latindevenaj radikoj. Tamen, ĝi sonas tre nemediteranea, kompare kun la prononco de la plimulte da esperantaj vortoj. Aliaj sonoj, kiu ne estas tre komunaj en la latinidaj lingvoj, krom la itala estas la *c*-sono (skribita *z* en la itala); kaj la aspirita *h*, kiun oni aŭdas nur en la rumana.

Parenteze, mi iam aŭdis radioprogramon, en kiu esperantistino kies denaska lingvo estas la angla, estis intervjuita de irlandia prezentantino. Ŝi petis, ke la gasto diru iun en Esperanto, kaj poste ĝi komentis, ke ĝi sonas kiel nordeŭropa lingvo. Certe ŝi havis tian impreson, pro la prononco de la persono intervjuata, kies denaska lingvo estas la angla. Kompreneble, bone prononcata Esperanto nepre ne donus tian impreson. Mi ne konsentas kun Claude Piron, kiam li skribas en iu el liaj alie ege rekomendindaj libroj, ke unu el la avantaĝoj de Esperanto estas tio, ke ĉiu rajtas prononci ĝin laŭ sia propra nacilingva akĉento. Claude mem havas imitinde bonan esperantan prononcon, do mi ne komprenas kial li ne insistas, ke oni klopodu imiti italan aŭ latinan prononcon, laŭ zamenhofa rekomendo. Nur pri tio mi ne konsentas kun li. Ideale, devus esti neeble

(aŭ preskaŭ neeble) rekoni la nacian devenon de esperantisto laŭ lia/ŝia prononco. Tamen, eĉ parolante kun iom da nacilingva akĉento, Esperanto ĉiam estas komprenebla.

Revenante al mia temo: kvankam la plej granda proporcio de la esperanta vortaro estas latindevena, grava parto devenas de aliaj lingvaj familioj. De la germana ni havas vortojn kiel *hundo*, *verŝajne*, *bedaŭro*, *ŝajni*, *ŝafo*; de la angla: *birdo*, *boato*, *najbaro*, *ŝipo*; de la rusa: *kolbaso*, *krom*, *po*, *blino*; de la greka: la konjunkcio *kaj*, kune kun multege da doktaj kaj sciencaj terminoj, kiuj cetere estas internaciaj; de la franca, multege da radikoj: *deĵori*, *ĉapelo*, *ĉikani*, *avio*. Kontraste, el la aliaj lingvoj, kiujn Zamenhof aŭdis ĉirkaŭ li ekde sia infaneco, t.e. la jida kaj la pola, estas malmultaj ekzemploj: el la jida: *ŝlemilo*; el la pola *ŝelko* sed apenaŭ pli. Hodiaŭ, aperas en esperantaj tekstoj kaj konversacio kelkaj vortoj el asiaj lingvoj, precipe la japana kaj la ĉina, sed la plimultoj estas jam uzataj internacie, kiel *tohuo*, *sojo*, *ĵudo*.

La itala kontribuas kelkajn belajn aŭ esprimplenajn vortojn kiel *lontana* kaj *pigra*, sed tiaj vortoj estas rigardataj kiel poeziaj kaj literaturaj, ne kiel normalaj tuttagaj esprimoj.

Entute, do, la esperanta vortaro estas precipe latindevena. Tamen, kelkaj trajtoj de la strukturo de Esperanto estas tute fremdaj al tiu lingvofamilio. Jes, la vortordo sekvas tiun de la plimulto da eŭropaj idiomoj, nome: subjekto, verbo, objekto, kaj la akcento sur la antaŭlasta silabo estas la plej komuna en multaj lingvoj, ne nur en la pola kaj la latina.

La verbosistemo en Esperanto havas kelkajn unikajn karakterizaĵojn. Neniu alia lingvo, kiun mi konas uzas nur kvin simplajn finaĵojn: *-as*, *-is*, *-os*, *-us*, *-u*, por indiki la tenseon, tempon aŭ modon. Aliflanke, se oni preferas pli komplikan verban strukturojn por distingi fajnajn nuancojn, aŭ por pedante demonstri onies klasikan edukadon, la Plena Analiza Gramatiko montras kiel oni povas imiti ekscentrikaĵojn kiel la latina ablativo absoluta, aŭ la helena tria voĉo. Feliĉe malmultaj esperantistoj ekspluatas tiajn eblecojn.

En la slavaj lingvoj estas verba karakterizaĵo, kiu ĝenerale por neslavaj estas malfacila kaj apenaŭ komprenebla. Temas pri la tiel nomata *aspekto*, jene definita de PIV: “Konjugacia formo, per kiu iuj lingvoj esprimas la manieron, kiel oni rigardas aŭ prezentas agojn, ĉu kiel komencantajn,



daŭrantajn aŭ nedaŭrantajn, ripetiĝantajn aŭ finitajn.” Fakte, por esperantistoj, tia formo ne plu necesas esti mistera, ĉar similaĵo ekzistas en Esperanto, ekzemple: *fosi, ekfosi, prifosi, fosadi; legi, eklegi, finlegi, legadi*, ktp. Do, kvankam la baza strukturo de la verbo en Esperanto estas simplega, ĝi povas esti multe pli esprimriĉa ol en aliaj lingvoj. Plie ĝi helpas nin lerni aliajn lingvojn, eĉ tiujn kies strukturo estas tute malsama ol tiu de nia denaska lingvo. Tio estas la tiel nomata *propedeŭtika* valoro de Esperanto.

Mi mencias, ke la vortaro de Esperanto apenaŭ montras influon de la jida lingvo, kvankam Zamenhoj estis juda kaj loĝis en urbo kie dek procento de la loĝantoj estis judaj. Li eĉ verkis gramatikon de la jida lingvo. Kompreneble, en epoko kiam la juda popolo estis malestimata kaj persekutata, Zamenhoj ne volis tro emfazi sian judecon. Tamen en iu tezo, kiun mi verkis por la licencio en Esperanto, mi argumentas, ke lia juda heredaĵo ludis gravan rolon ĉe la kreado de la zamenhofa lingvo. Ni scias, ke Zamenhof tre admiris la faman hebrean rabenon Hillel, kies influon kelkaj kleruloj pretendas trovi en la instruado de Jesuo. Zamenhof eĉ ambiciis fondi tolereman eklektikan religion (homaranismon) bazitan sur la principoj de Hillel.

En la menciita skribaĵo, mi provas defendi la tezon, “ke la instruajtoj de la rabeno Hillel kredeble influis ne nur la evoluadon de la tiel nomata ‘hilelismo’ de Zamenhof, sed ankaŭ la principojn, kiuj gvidis la kreadon de la internacia lingvo Esperanto”. Fakte estas, ke Hillel, kiu vivis ĉirkaŭ 75 aK ĝis la 10 pK, estis ne nur religia kleriko, sed ankaŭ grava edukisto en pli ĝenerala senco. Estas evidente, ke Zamenhof ĝisfunde konis la hilelajn ideojn inkluzive de lia pedagogia sistemo, laŭ kiu kiu reliefigas la tiel nomataj sep *middot* (normoj) de Hillel pri la tekniko de indukto kaj rezonado, t.e.:

- (1) inferenco el kio estas malpli grava al kio estas pli grava, kaj inverse;
- (2) inferenco laŭ analogeco;
- (3) kungrupigo de afirmaj elementoj laŭ iu interpreta principo, kiu validas precipe por unu el ili;
- (4) simila kungrupigo en kiu la principo validas por du elementoj;
- (5) inferenco el apartaĵo al ĝeneralizaĵo, kaj inverse;
- (6) ekzegezo per simila elemento, citaĵo aŭ eltiraĵo;
- (7) inferenco laŭ kunteksto.

Kvankam oni ne povas identigi ekzakte en ĉiu kazo, kiun el la sep *middot* Zamenhof konscie aŭ senkonscie aplikis ĉe ĉiu elemento aŭ stadio de evoluo de la internacia lingvo, mi opinias, ke oni ne povas dubi, ke familiareco kun la logiksistemo de Hillel gvidis la aŭtoron de Esperanto en la planado de sia lingvo.

Citu ni kelkajn ekzemplojn. Eble la plej ofte diskutata kaj plej originala zamenhofa radiko estas *edz-*. André Cherpillod, en sia *Akada (asirobabilona) leksikono*, sub la kapvorto *rabu*, skribas: “Etimo de la vorto *rabeno*. Oni ĉi tiu memorigu, ke la jida vorto *rebecin*, *rebezin* ‘rabezino’ estas la etimo de *edzino*, kaj *sekve de edzo*; en tiu jida vorto *ecin*, *edzin* estas la kunmetaĵo de la franca sufikzo *-in* (komparu kun la germana *Prinzessin* ‘princino’).”

Ĉi tiu citaĵo ekzemplas la hilelan metodon de rezonado. Nur menso influita de la rabenisma tradicio, kaj precipe de la hilela metologio en tiu tradicio, povus krei unu el la plej uzataj radikoj de sia planlingvo per tia komplika rezonado, tiel fremda al la okcidenta pensmaniero, kiun tamen Zamenhof ankaŭ heredis, kune kun sia juda heredaĵo. En la procedo de rezonado, kiu estigis la esperantan radikon *edz-*, ŝajne oni povas rekoni la influon de la *middot* de Hillel, ekzemple, (2), (3), (4), (5), kaj eble de aliaj.

Plia frapanta ekzemplo estas la invento de la radiko kaj finaĵo *ej*, kies origino Zamenhof mem klarigas en sia *Letero al N. Borovko pri la deveno de Esperanto en Lingvo internacia*, 1896, n-roj 6-7, *Esperantaj prozaĵoj*, paĝo 239: “Unu fojon ... mi okaze turnis la atenton al la surskribo *ŝvejcarskaja* (pordistejo), kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo *konditorskaja* (sukeraĵejo). Ĉi tiu *-skaja* ekinteresis min, kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon, el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne bezonas aparte ellernadi. Ĉi tiu penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la teruran grandegajn vortarojn falis radio de lumo kaj ili komencis malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.”

En ĉi tiu okazo estas evidente, ke Zamenhof profitis de hazarda observaĵo, kun helpo de sia neordinara intelekto, por solvi la problemon de la amplekso de vortaroj. Tamen lia rezonado en ĉi tiu kazo estas tute konforma al la metodologio de Hillel laŭ la *middot* (1) ĝis (7)..

**Girvan McKay**

**ALDONAĴO: Humuro en Esperanto – Raymond Schwarz – “La diversaj aĝoj de la homo”**

En supra ĉambro, lulo ...lulo  
Anĝele dormas la etulo:  
Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras  
Kaj pri la bela mondo miras:  
Miraĝo.

Jam ne plu side li tamburas,  
Sed tra la dom' explore kuras:  
Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)  
Revenas el stratbubaj bandoj  
Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo  
Knabinon ĉien sur la vojo:  
Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon  
Por fondi kune novan domon:  
Domaĝo.

Li tiam estas tre utila  
Fortika viro, kvankam vila:  
Vilaĝo.

Kaj post rapida tempopaso  
Postrestas nur senviva maso:  
Masaĝo.

**POSTSKRIBO**

Ni ne apliku al Virino  
Ĉi tiun viv- kaj rimo-saĝon  
Ĉar de l' komenco ĝis la fino  
Ŝi ĉiam havas saman aĝon:  
Avantaĝo.

# Neil M. Gunn: Laŭdinda Skota Aŭtoro

Antaŭnelonge mi vizitis Sutherland kaj Caithness en Norda Skotlando. Mi volis iri tien, ĉar mi ofte, kiel infano, vizitis parencojn tie. Mia patro loĝis en ambaŭ lokoj kiam li estis juna. Survoje ni vizitis la centron Dunbeath. kaj por la unua fojo mi lernis pri la aŭtoro, Neil Gunn, kiu naskiĝis tie ĵus antaŭ la komenco de la dudeka jarcento. La malgrandan ekspozicion mi trovis ege interesa. Unu el la vendeblaj libroj estis elektita kaj mi tuj komencis legi mian unuan libron de Neil Gunn. Ĝi nomiĝis: **The Key of the Chest.**

Rekte de la komenco la enhavo tute kaptis min. Ĝi estas rakonto pri ŝipo kiu pereis sur la danĝera altlanda marbordo. Tre kuraĝa viro provis savi mariston kiu tenis lignan keston. Bedaŭrinde la maristo mortis, sed la afero ne finiĝis tie, kaj multe da demandoj kaj problemoj sekvis.

Gunn bone priskribis la karakterojn de la homoj - ĉefe fiŝkaptistoj. Mi trovis, ke mi rekonis la tipojn de homoj kiujn mi memoras de mia infaneco; ili estis tre fortaj, sentimaj homoj por kiuj la vivo ne estis facila; ili devis ege forte labori. De tempo al tempo Gunn pentris belegajn bildojn montrantajn la belecon de la lando kaj la maro:

*The heather was in full bloom. Its purple wash lapped hillock and boulder and ran inland with the eye. There was such a lot of it, and as it receded in slow waves, it gathered the mist and bloom of purple. The freshness that had followed the storm was still in the air, was warm under the September sun, and the fragrance of the heather was an exquisite memory of wild honey.*

En alia libro, **Morning Tide**, ni denove renkontas homojn el marborda komunumo. La centra karaktero estas juna knabo nomita Hugh, kaj Gunn esploris lian vekiĝadon al vivo en la familia rondo kaj en la loka komunumo. Ŝajnas, ke Gunn uzis sian propran sperton de juneco: lia patro estis fiŝkaptisto. Ni unue renkontas Hugh sur la strando kie li kolektas muskolojn. Kompreneble mangaĵo ofte mankis en tiuj tempoj, li estas malbone vestita kaj malsata. Gunn tiel bone priskribis la situacion, ke mi

preskaŭ povis senti la doloron de liaj fingroj, kaj mi preskaŭ aŭdis la bruon de la maro en la senhoma, malvarma loko.

Estas tre kortuŝa incidento en la libro kiam la frato de Hugh estas preta forlasi la hejmon por elmigri al Aŭstralio. La patrino scias, ke ŝi neniam plu vidos sian filon, sed ŝi simple preparas la lastan ĉefmanĝon, kaj ne embarasas la junulon per monstro de emocio. Histrionajoj neniam havis lokojn en la vivoj de tiuj homoj.

*His mother was in good form this night. Her kindness lapped all around them. Her heart was overflowing with kindness. Her gestures were warm and inviting. She had a great tea for them. Liver and bacon and gravy. Plenty of butter and Abernethy biscuits, scones, jam, a crusty loaf. "Be eating now. Make a good tea, bairns."*

**Highland River** ankaŭ havas junulon kiu estas la ĉefa homo en la renkonto. Kenn havas ligan - aktualan kaj mensan - kun la rivero apud sia vilaĝo. La aŭtoro kapable priskribas - tra la okuloj de Kenn - la riveron en ĉiuj ĝiaj statoj: dum la vintro ĝi estas nigra, timega afero; ankaŭ ĝi estas malvarme bela kiam, post frosta nokto, la arbustoj ĉe la bordoj briletas kaj la rivero fluas kvazaŭ kuranta arĝento. Kompreneble Kenn preferas ĝin dum la somero kiam ĝi taŭgas por naĝado.

Iun matenon, Kenn post grandaj streboj sukcesas kapti grandan salmon. Liaj gepatroj ne povas kredi ke li faris ĝin sole.

Gunn ofte mencias la danĝerojn de ŝtelĉasado. La virinoj timis ĉu la bona nomo de la familio perdiĝus, sed kutime akceptis la salmon aŭ kuniklon nevolonte, sed la patro de Kenn certe estas tre fiera, ĉar Kenn kaptis tian grandan, bonan fiŝon.

*His father was a great and daring seaman; when he read the bible and prayed he was a bearded, patriarchal man; in danger his spirit flashed indomitable and challenging. Now his features softened in a slow winning smile, touched to the breath of wonder. His son felt it without looking at it, felt it in the breath of his voice, and a weakening warmth ran about his heart.*

*"Did anyone see you?" asked his mother. It was likely. "No," he muttered. "How did you land him?" asked his father. "With my hands."*

Poste en la libro ĉio fariĝas tre malbone. Kenn kaj lia adorata frato - post feliĉa juneco - trovas sin en la mezo de la abomeno kiu estis la Unua Mondmilito. Hazarde Kenn renkontas sian fraton en la tranĉejoj; li tute ŝokiĝas kiam li vidas lin: la belaspekta, sentima frato de iliaj junecaj tagoj nun estas malsana fantomo de viro. Spite de ĉio la du viroj ne montras emociion aŭ timon, ĉar en tiuj tagoj homoj ne montris karemecon. La amo vere estis tie, forta kaj daŭra, sed ĉiam iomete sub la surfaco.

La norda rivero estas la fizika kaj spirita fonto al kiu Kenn reiras dum sia tuta vivo. Ne gravas kien li iras, la rivero ankaŭ iras en sia imago.

Por ĉi tiu ege bone verkita libro Neil Gunn gajnis tre prestiĝan premion.

La sentoj de Gunn pri faŝismo kaj totalismaj ŝtatoj estas klare montritaj en **The Green Isle of the Great Deep**. La rakonto centriĝas sur Art, juna knabo kaj sur maljuna viro nomita Hector.

Unu vesperon la vilaĝanoj diskutas artikolon en la ĵurnalo pri iu registaro kiu volas regi la mensojn kaj pensojn de la homoj. Tio tute ŝokas ilin; ili ne povas imagi ion similan en sia altlanda, trankvila vilaĝo. La sekvantan tagon, Art kaj Hector iras al al la rivero, ambaŭ enfalas kaj ŝajnas, ke ili dronas; sed Gunn turnas la dronitan staton de la du en longan sonĝon. La du amikoj trovas sin en stranga lando kiu tre similas al ilia propra. Tie ili renkontas homojn kiujn ili rekonas, sed ankaŭ estas aliaj tie kiuj havas grandan povon super la mensoj de la popolo. Iomete post iomete la situacio fariĝas pli kaj pli minaca.

La duopo spertas multe da strangaj, timigaj aventuroj ĝis en la lasta ĉapitro la rakonto revenas al la reala vivo kie amikoj laboras por ilin revivigi, do ĉio finiĝas bone kaj en la sonĝoj de ambaŭ la volo de la popolo venkas.

Gunn uzas kelke da libroj por esplori kaj ekspluati sian intereson pri Zenismo. Pri tio mi povas fari neniun komenton, ĉar mi scias nenion pri la temo; kaj mi ne estas spertulo pri lia tuta verkaro; li estas novrenkontita aŭtoro por mi.

La aferoj de skota historio multe allogis lin, kaj li forte interesiĝis pri politikaj aferoj; li subtenis la ideologion de la Skota Nacia Partio. Li kvarfoje verkis librojn pri traŭmaj periodoj en Skotlando. Ili estas **The**

**Drinking Well, Silver Darlings, Butcher's Broom** kaj **Sun Circle**. En tiaj libroj li klarigis la signifon de gravaj pasintaj eventoj.

En **Sun Circle** la piktaj viliĝanoj- kelkaj el ili estas novaj Kristanoj- atendas la alvenon de la Vikingoj. Ĉi tiu libro ne estas mia plej ŝatata. En ĝi Gunn skribas – laŭ mi - iomete strange. La dialogoj inter homoj ofte ne estas tute klaraj: frazoj ofte ne estas finitaj, kaj la leganto devas mem decidi kion oni fakte volas diri. Li eble skribas tielmaniere pro la necerto pri kiu vere okazis, ĉar malmulte estas konata pri la periodo. Sed li bone kaptas la streĉitecon inter la Kristanoj kaj la Druidoj - nenio ŝanĝiĝas, ĉiam ekzistis kaj ekzistos streĉiteco inter homoj pri religiaj aferoj. Mi persone pensas, ke Gunn plej brile verkas kiam li ne eskapas en la mondon de mitoj kaj misteroj, sed kiam li uzas sian propran sperton pri sia juneco, kaj kondukas la leganton en la mensojn kaj korojn de la ordinaraj altlandaj viliĝanoj. Sed tio nur estas mia gusto; aliaj eble ne konsentas.

Mi trovis libron nomitan **Highland Pack**: tute ĉarma kolekto de diversecaj eseoj en kiuj Gunn montras grandan amon por la maro kaj ŝipetoj. La enhavo inkluzivas rakonton pri la Insuloj Flannan. Li esploras la misteron pri la malapero de la lumturgardistoj. Mi donis unu eseon –**The Factor's Tale** al John Francis kaj li tre afable faris tradukon [*Red.: Ĝi troviĝas ĉefine de ĉi tiu artikolo!*]. Laŭ mia scio ĝi estas la unua traduko en Esperanton de iu verko de Neil Gunn. Mi tre aplaŭdis kion li faris; li vere estas majstro de la tradukarto!

Neil Gunn estas unu el niaj elstaraj skotaj aŭtoroj. Li gajnis la premion James Tait Black. Ĝi estas tre prestiĝa premio, kaj gajninte ĝin, li estis en la bona kompanio de Arnold Bennet, John Buchan, Salman Rushdie, kaj aliaj bonekonataj aŭtoroj.

Monumento al Gunn troviĝas en Dingwall, kaj ankaŭ li okupas memorlokon en Makars' Court en la Writers' Museum en Edinburgo; sed la plej bona memoraĵo estas en la libroj mem.

**Jean J. BISSET**

# La Faktora Rakonto

de Neil M. GUNN

Dum tagoj kiam milito limigas la eblojn veturi, estas aparta plezuro ek trovi unu el tiuj private eldonitaj libroj de rememoroj, kiuj, kvankam dediĉitaj al personoj kaj familiaj aferoj, tamen de tempo al tempo iluminas unu el tiuj “protektitaj” lokoj iam intime konataj – tiel intime kiel mi konis Gress kaj Stornoway en Lewis. Mi ĵus estis trafoluminta tian libron, skribitan kiam li havis pli ol okdek jarojn, de Evander Maciver, kiu naskiĝis en Gress, apud Stornoway, en 1811, kaj kiu siatempe estis faktoro al pli ol unu gaela bienposedanto, inkluzive la Dukon de Sutherland.

Faktoroj en la gaela regiono eble ne havis enviindan reputacion ekde la amaraj tagoj de la senposedigoj, sed S-ro Maciver havis pli noblan karakteron, kaj kvankam unuj el ni eble malkonsentas kun iuj liaj opinioj rilate la traktadon de certaj bazaj ekonomiaj aferoj en la gaela situacio, tamen lia sinteno estis justa, kaj kiam ajn eble, malavara. Cetere, eble estas refreŝige rigardi gaelujon tra la okuloj de faktoro.

Sed ja domaĝe ke li ne estis opiniante ke meritas la penon iom detale priskribi la aktivan vivon de urbo kia Stornoway, kie lia patro direktis tiom da variaj komercaj entreprenoj ĉe la komenciĝo de la pasinta jarcento! Sed supozeble la afero estis tro ordinara, tro bagatela (kiel efektive la ĉirkaŭa, ĉiutaga vivo estas por la plimulto el ni) kvankam intersaj faktoj povas sin montri. Mi foje scivolis kial dum tia periodo homoj klopodis persvadi komplezan vojaĝanton porti leteron aŭ depeŝon por ili. Estis neniu cenzurado tiam en la Gaela regiono, kaj mi ne povis kredi ke nia poŝto estis arbitra. La kaŭzo estas nun klara. Letero de Stornoway al Londono kostis unu ŝilingon kaj kvin kaj duono pencojn, kaj se iu “ekstraĵo” enmetiĝis, kia ĉeko aŭ fakturo, la kosto duobliĝis. La kosto de la komunikaĵoj de S-ro Maciver al Londono ofte atingis plurajn pundojn sterlingajn. Ĝis 1832 unu ŝalupo semajne velis al kaj de Poolewe, kaj severa vetero tute laŭkutime malhelpis ĝian veladon dum monato. Post 1832 la Registaro persvadiĝis pagi iomete pli, kaj la ŝalupo strebis veli dufoje semajne. Post malpli ol jarcento ni jam flugadis la distancon dum nur kelkaj minutoj!

Evander Maciver, kiu mortis nur en 1903, estis en sia fina jaro ĉe Edinburga Akademio kiam la instruisto iufoje deziris ke li legu laŭgreke el



ĉapitro de la Anabaso de Ksenofono kompleze al du sinjoroj kiuj envenis en la klasĉambron, “kiel ofte faris vizitantoj. Unu el ili”, kronikas Maciver, “estis peza, malvigla, ruĝvizaĝa, grizhara sinjoro kiu malsuprentenis la kapon kaj vizaĝon sen iu ajn inklino al viveco. Li estis bone konata al multaj el miaj kunlernantoj, kaj flustro tuj cirkulis ke li estas Sir Valter Scott”.

Sed lia rakonto pri ribelo kaj pafado kaj la enterigo de arĝentaj dolaroj en la strando norde de Stornoway-haveno estas lia elstara “incidento”. Li estis knabo havanta dek kvar jarojn je tiu tempo, kaj kion li aparte memoras, tio “estis la alveno al la Doganejo de kelkaj ĉaroj portantaj arĝentajn dolarojn, kaj la amasiĝon de la tuta loĝantaro de Stornoway, junaj kaj maljunaj, viraj kaj virinaj por vidi tian mirindan vidaĵon kia ĉarplenojn de arĝento en la urbaj stratoj”.

Estas sombra rakonto kun sombra finaĵo. Ses aŭ sep maristoj, inkluzive de knabo, albordiĝis ĉe Kokida Kabo, apud la farmbieno de Glavovalo, kaj ŝirmis sin en kaverno. Ili diris ke ilia ŝipo pereis, sed ke ili sukcesis eskapi en boato. Kiam novaĵo pri la ŝippereo atingis la Doganejon, du oficiroj iris al la kaverno por esplori kaj helpi.

La plimultaj ŝipanoj devenis de la marborda regiono de la graflando Fife, kaj estis unu franco – kruda, moroza homo. Li laŭrutine donis ĉiujn necesajn detalojn rilate al la perdita ŝipo, kaj la oficistoj, kontentigite, estis reirantaj al la Doganejo kiam la knabo anhelante kuratingis ilin. Kaj tie senprokraste, per spasme necerta angla lingvo, li elbalbutis sian eksterordinaran rakonton. La maato kaj la kuiristo murdis la ŝipestron kaj la superkargon. Estis bareloj de arĝentaj dolaroj en la ŝipo. La murdintoj subaĉetis la ceterajn ŝipanojn, dividinte kun ili la dolarojn. La dolarojn ili porciumis inter ĉiuj. Ili distranĉis ĉiujn kanvaserojn sur la ŝipo kaj el la pecoj kunkudris sakojn. Ĉiu maristo ensakigis proprajn monerojn, kaj la tuta trezoro estis nun sub la kaverna sablo.

La oficistoj apenaŭ asimilis ĉi tiujn mirigajn asertojn antaŭ ol la maato aperis, parolis “kolere kaj krude” al la knabo, kaj ordonis lin reiri tuj al la kaverno.

“Sed la doganaj sinjoroj subtenis la knabon”, akompanis lin al Stornoway, kaj raportis la aferon al oficialaj instancoj. La postan tagon trupo ekiris, celante la kavernon por laŭordone aresti la ŝipanaron kaj konfiski ties havaĵojn. La sakojn de dolaroj oni, kiel atendite, trovis kaj portis al Glavovalo, kie “oni lasis ilin dum la nokto” en la grenejo. La sekvintan

tagon la bienaj ĉaroj portadis la trezoron al la Doganejo tra la tumultantaj urbanejoj, kaj “la ŝipanaro estis loĝigita en hotelo” sub respondeca kontrolado de la magistratoj, ĉar Stornoway havis neniun Prokuroron, kaj la Skaben-anstataŭanto forestis ĉe la bieno apud Gairloch.

Fakte, oni plenumis ĉion laŭ tiel deca kaj trankvila maniero ke laŭŝajne “sufiĉe granda parto” de la arĝento “estis elprenita, sed de kiu aŭ kiel neniam fariĝis konata”, dum ĝi kuŝadis dumnokte en la grenejo. Dum unu-du jaroj arĝentaj dolaroj eniradis la moncirkuladon de Stornoway, kaj estis regule parto de la moneroj donataj kontraŭ punda bileto. La postan jaron S-ro Maciver forportis kun si “kelkajn dolarojn por kiuj mi donis po tri ŝilingoj kaj dek pencoj, de arĝentisto ĉe la Norda Ponto, Edinburgo”.

Tamen oni starigis enketadon, kiu daŭris kelkajn tagojn, kaj rezulte de ĝi oni interkonsentis ke estos konsilinde raporti la tutan aferon al la Lorda Advokato. Post iom da tempo fiska kutro alvenis de Leith kaj liberigis Stornoway je la maristoj kaj la dolaroj (krom tiuj kiujn oni private retenis) kaj poste revenis por kargo de atestantoj.

Dum la proceso multaj aferoj fariĝis klaraj. La ŝipo estis skuno velanta de Malto al Sudameriko, kaj la knabonsurŝipigis la patro, simple por trovi ĉu li efektive ŝatos esti maristo. La patro aranĝis ke li dormu kun la ŝipestro, kaj tial okazis ke li efektive vidis la ŝipestron pafita, dum li aŭdis la luktadon kaj pafon kiu eliniris la superkargon.

La kargo de olivoleo kaj abelvakso apartenis al la superkargo, kiel ankaŭ la miloj de arĝentaj dolaroj, kaj, post privata sugesto al li, la ŝipestro ordonis ke tiuj pakiĝu en fortaj bareloj kaj stiviĝu en la holdo. Tamen la ŝipestro, dum malforta, eĉ se homeca momento (ĉar konversaciaj temoj mankas dum tia vojaĝo) sciigis la maaton pri la metalmono. Kiel okazis, la kuiristo deĵoris dum la vaĉo de la maato, kaj dum eĉ pli malforta momento la maato (Skoto) sciigis la kuiriston (Francon). La kuiristo kovis komploton kaj komplicigis la maaton. Sendinte la ceteron de la ŝipanaro por dormi, la Malnova Alianco fermis la fikstabulojn super ili, kaj komencis siajn fiajn kaj murdemajn agojn. Ĉe la proceso la cetero atestis kontraŭ ili, kaj oni verdiktis la paron kulpa kaj “ili pendumiĝis je la flusa marko ĉe Leith”.

Se la juna Maciver estus doninta sian personan version de tiu ĉi rakonto anstataŭ tradukadon de Ksenofono en klaso, oni scivolas kiel ĝi estus efikinta la pezan, flegman ruĝvizaĝan sinjoron kiu suprentenadis sian vizaĝon sen ajna signo de viveco.

**tradukis John FRANCIS**

# El la redakcia rubujo

Estas bone konata, kvankam plej bedaŭrinda, fakto ke nia kara haltredaktoro tro ŝatas alkoholaĵojn (kaj ne nur por purigi vundojn). Kvankam tiu feblo ne multe helpas al la redakcia teamo, almenaŭ ĝi garantias al ni neregulan fluon da rakontoj kaj spritaĵoj el tavernoj de Callander ĝis Kalabrio. Antaŭnelonge alvenis foliaĉo, sen poŝtmarko, sen subskribo sed preskaŭ certe de tiu tavernulo .....

En Glasgovo, antaŭ iom da tempo, multe amata membro de la loka Esperanto-klubo promenadis trans la placon Georgo (urbocentre), kaj subite eksvenis kaj falis teren. Kiel vi scias, la glasgovanoj estas plej helpemaj (kaj scivolemaj) uloj, do baldaŭ estis amaseto da lokuloj ĉirkaŭ nia samideano.

- Voku ambulancon! - diris unu - Kuraciston !
- En tiaj cirkonstancoj - konsilis maljuna, karakteriza glasgovano - plej bone iometo da viskio.
- Disiĝu, disigiĝu ! - diris la unua. - Lasu al li iom da aero !
- Mi certas ke pli efikus guteto da viskio. - ripetis la oldulo.

Tiumomente, nia estimata amiko ekmalfermis la okulojn kaj, per malforta voĉo, diris al la gapantoj:

- Silentu, silentu ! Permesu paroli tiun saĝan sinjoron.

\*\*\*

Antaŭnelonge nia sama hepatredaktoro, dum kuraca restado en Kalabrio (San Pantaleo, patrono de drinkemuloj) renkontis konaton kun buntaj kontuzoj trans la vizaĝo.

- Sankta akuzativo ! Kio okazis ?
- Policano okazis, priatado okazis.
- Ho ve, oni ne farus tiel en Airdrie [kultura urbeto en meza Skotlando
- red.] - Kio donis al li rajton tiel kondukti, tiu policano ?
- Bastono donis.

\*\*\*

Okazis, antaŭ kelkaj monatoj, ke unu el niaj pli eminentaj kolegoj - profesoro, akademiano, klubkasisto, k.c. - devis alvoki tubiston por ripari ion en la banĉambro. La tubisto akurate alvenis, eltrinkis teon kaj laboris dum duonhoro, laŭ tubista kalkulsistemo.

- Jen ĉio, senprobleme.

- Mi ege dankas. Kiom mi ŝuldas?

- Sesdek pundojn, mi petas.

- Kiel eblas? Mi estas profesoro en altlernejo, dumviva membro de fama akademio, komitatano de landa asocio, kaj mi ne tiom gajnas en eĉ tuta horo.

- Jes, mi scias. - respondis la tubisto. - Nek mi kiam mi estis profesoro.

\*\*\*

Kiam la antaŭmenciita helikredaktoro lastfoje trapasis Skotlandon, li vizitis la edinburgan grupon por tie gastbareli. Post longa vespero da lingvaj kaj kubutaj ekzercoj, li anoncis ke, pro la klimata krizo li hejmeniros aŭtobuse (videblis tamen almenaŭ unu alia, pli evidenta kialo). Li bone trovis la haltejon kaj eniris la unuan aŭtobuson, por ekscii ke ĝi iras ne al Glasgovo sed al Fife [agri-kultura regiono en orienta Skotlando - red.]. Li eliris, trovis alian haltejon, alian aŭtobuson - denove erare. Fine, la trian fojon, li sukcese trafis la ĝustan aŭtobuson kaj eksidis, samtempe kantante " Mi estas el Glasgovo..." laŭ la melodio de "La balo de Kirriemuir". Severmiena pastro - laŭaspekte volapukisto - rigardis lin kaj sentencis:

- Ho ve, sentaŭgulo ! Jen la vojo rekte al l' infero !

- Fifurz' ! - ekkriis nia karulo - Ĉu mi denove eraris ?

\*\*\*

Piede de la foliaĉo el Kalabrio, "Penso por la moŝtaj legantoj" :

- Niaj politikistoj promesis al ni ke post la baloto, "Ni plibone statos". Kaj veras - ili ja plibone statas.

\*\*\*

Ne estas sekreto ke nia kompatinda haltredaktoro iel mislokis almenaŭ unu edzinon dum lastaj jaroj. Eble pro tio, li iom interesiĝas pri la temo de geedzaj rilatoj kaj ofertis al Ni tiujn juvelaĉojn el sia vivosperto .....

\*\*\*

Iun nokton, virino (konata al ni ĉiuj) ne hejmenvenis. La morgaŭan matenon, ŝi klarigis al la edzo ke ŝi tranoktis ĉe amikino. La edzo telefonis al dek ŝiaj plej intimaj amikinoj. Neniu povis konfirmi la fabelon.

Iun nokton, viro ne hejmen venis (kompreneble, ne skotlanda samideano). La morgaŭan matenon, li klarigis al la edzino ke li tranoktis ĉe amiko. La edzino telefonis al dek liaj plej intimaj amikoj. Ok konfirmis ke li jes tranoktis, kaj du diris ke li fakte estas ankoraŭ tie.....

\*\*\*

Talpredaktoro, post longa, pena pensado: ' Ĉu vi rimarkis, kara, ke plej grandaj stultuloj havas plej belajn edzinojn ? '

Ties edzino: ' Nu, dankon, kara ! '

\*\*\*

La sama, malfeliĉa edzino: ' Oj, aŭskultu: krucvortan demandon. Birdo ne plu ekzistanta, ses literoj..... ? '

La sama palpredaktoro: ' Nia papago. Hieraŭ la kato ĝin manĝis. '

\*\*\*

Antaŭ sufiĉe da jaroj, kiam tiu velkredaktoro ankoraŭ havis salajratan postenon, li telefonis el la laborejo por averti la edzinon ke li invitis kolegon akompani lin hejmen.

'Ĉu vi tute freneziĝas,' respondis la karulino. 'Ĉu vi jam forgesis ke hodiaŭ mi faras la lavadon; mi deprenis ĉiujn kurtenojn; via fileto malsanas pro

lakso kaj mi pro kataro; la necesejo misfunkcias kaj cetere estas nur burgeroj por la vespermanĝo. '

'En ordo, kara mia. Mia kolego ĵus fianĉiĝis; por li estos tre helpe spekti la familian vivon ! '

\*\*\*

Lanarkŝira kamparano iam onde sur plaĝon portiĝis post ŝipvrakiĝo. Solaj kun li surteriĝis ankaŭ nur ŝafo kaj ŝafhundo.

Ĉirkaŭrigardante, li konsciis, ke ili grundiĝis forlasite sur senhoma insulo. Post iom da tempo da vivado tie, li al kutimiĝis promeni kune kun siaj du bestaj akompanantoj al la plaĝo ĉiun vesperon por spekti la sunsubiron.

Iun apartan vesperon, la ĉielo estis fajrece ruĝa, kun belaj cirusaj nuboj; la zefiroj estis varmetaj kaj leĝeraj – perfekta nokto por romantiko. Dum ili tie sidis, la ŝafo komenciĝis aspekti pli kaj pli bele al la soleca lanarkŝirano. Baldaŭ, li kliniĝis al la ŝafo, kaj ... ĉirkaŭbrakumis ĝin.

Tamen, la ŝafhundo, ĉiam protektema pri la ŝafo, graŭlis feroce ĝis la viro forprenis sian brakon disde la ŝafo. ... Post tiu okazo, ili tri daŭre ĝuadis kune la sunsubirojn, sed ne plu estis iaj provoj pri karesado.

Pasis kelkaj semajnoj, kaj jen, okazis plua ŝipvrakiĝo. La sola tiufoja supervivinto estis belega junulino, la plej bela virino kiun iam vidis la kamparano. Ŝi ne tre bone fartis, kaj li flegadis ŝin laŭgrade reen al plena sano.

Kiam la juna fraŭlino resaniĝis, li invitis ŝin al ilia vespera plaĝ-ritualo. Denove estis bela vespero ... ruĝa ĉielo, cirusaj nuboj, varma leĝera zefiro – perfekte estis por nokto de romantiko.

Sufiĉe baldaŭ, la lanarkŝirano eksentis denove “tiujn sentojn”. Li batalis kontraŭ la emoj dum tiom longe kiom li eblis, sed finfine li cedis, kaj ekkonsciante, ke li havas oportunon, kliniĝis singarde al la juna virino, kaj flustris en ŝian orelon ...

“Ĉu vi bonvole farus al mi komplezon per promenigi la hundon? ...”

# Norah Brown

14 March 1928 – 11 August 2008



Ŝia patro estis Frederick James Sheppard, ĉiam kiel Jack aludata, kaporalo en la Northamptonŝira Regimento. Ŝia patrino estis Emmie Norah, ĉiam kiel Nancy aludata, kiu supren laborigis sin de la nivelo de kuireja servistino ĝis kuiristino, kaj kiu iam laboris dum la unua mondmilito por la familio de la lernejestro de Eton. Norah rakontis ke ŝia patrino veturigis eĉ tiam motociklon, probable ne ofta vidaĵo dum la 1920-aj jaroj! Ŝia patrino estis en Northampton kiam ŝi renkontis Jack kaj tie ŝi naskiĝis la 14an de marto, 1928. Tiam loĝis la familio en la kazerno de ŝia patro en Colchester, kaj poste en Aldershot.

Dum la fruaj 1930-aj jaroj kiam Norah estis proksimume 6-jaraĝa, ili tranlokiĝis al norda Hindio kien oni postenigis ŝian patron kun la armeo. La regula kutimo moviĝi de la montoj al la ebenaĵoj kaj inverse ĉiun jaron por elteni la klimaton signifis konstantan ŝanĝiĝon por Norah, sed tio estis grava parto de ŝia frua vivo, kaj ĝi sendube formis ŝian vidpunkton pri la mondo. Ŝiaj memoroj pri Hindio inkluzivis certagradan liberecon kiun ŝi ne spertintus en Anglio. Ŝia patrino ŝajne bonvenigis la situacion prefere al peni izoli ilin disde ĝi. Kvankam ŝia patrino estis sufiĉe regema persono, Norah memoris belegajn tempojn kiam ŝi estis juna, priskribante sian panjon kiel 'amuza kaj sufiĉe aventurema', kaj vizitis ĉiajn speciale interesajn lokojn en Hindio, inkluzive la Taĝ Mahal, grimpante ĝiajn minaretojn supre senmanapogilajn!

Dum sia tempo en Hindio, Norah kolektis iujn malgrandajn eburajn figuretojn – kolektitaj trans la jaroj en Hindio uzante sian poŝmonon – kredeble ŝi amegis tiujn kaj tenis ilin ankoraŭ sur breto en sia dormoĉambro ĉe la fino de sia vivo.

Norah kaj ŝia patrino post kvin jaroj revenis ĉe la komenciĝo de la milito, reirante al Northampton. Ŝia patro fariĝis serĝent-majoro, zorganta pri lagero pormilitkaptita, kaj daŭre servis kun la armeo en Hindio dum la tuta milito. Unu malliberulo tie, Italo, estis ankaŭ pentristo, kaj pentris por ŝia patro malgrandan bildon de la lagero sur peco de kartono, kun la kabanaj kaj korto en la antaŭo kaj fone la montoj – ankaŭ bildo kiun Norah retenis kaj amis, kaj kiu dum multaj jaroj restis super ŝia lito ĉehejme.

La armeaj lernejoj en Hindio ne multon faris por Norah, kaj ŝia patrino sendis ŝin al monaĥineja lernejo kiam haveblis. Kiam ili reiris al Anglio, Norah troaĝis por la fina ekzameno por 11-jaruloj forlasontaj la elementa



lernejo, kaj ŝia patrino decidis pagi lokon en bona lernejo. Sendube ĉi tion la panjo malfacile kapablis fari, kaj Norah diris, ke ŝi grumblis kiam la panjo forigis la plej bonajn posedaĵojn kiujn ili reportis de Hindio, ne konsciante ĝis multe pli poste ke tiuj uzitis por pagi la lerneajn kotizojn, kaj ke ŝia panjo verŝajne revenigis ilin precipe por helpi pagi tiajn kostojn. La memoro de Norah pri sia patrino estis, ke ŝi emis esti tre praktika, kaj laŭ sia propra maniero faris ĉion kion ŝi povis por ŝi. En la lernejo Norah tre kapablis, kaj povintus progresi pluen – eble ŝi farintus ion, kian biologion – kio interesis al ŝi – se estus ebleco, sed ŝia panjo ne povus subteni ŝin tra ĉio ĉi, kaj eble sentis ke ia posteno tiam pli gravus.

Ŝia paĉjo estis en la unua grupo de malmobilizitoj ĉefine de la milito kaj revenis al Anglio. Kiam li revenis, ili transloĝiĝis al Tolworth. Norah ne ŝatis Tolworth, kaj forlasis lerneajn amikojn en Northampton. Ne estis feliĉa tempo, kaj ŝia patrino ekprenis al si iom tro da regado en ŝia vivo. Norah ĉiam bedaŭris ke tiu periodo kuna ne estis pli ĝoja por ili ĉiuj.

Pli poste ŝi renkontis Harold en la laborejo, kaj ili transloĝiĝis al Londono, kaj en vera senco Norah forkuris. Harold kaj Norah geedziĝis la 18an de septembro 1954 en preĝejo en Surbiton – preĝejo kiel lokalo en la realo ne estis ilia propra elekto; pli estis por plaĉi al ambaŭ patrinoj!

Norah certe ĉirkaŭiĝis de la kulturaj ŝanĝoj de la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj, inkluzive de la hinda klasika muziko kiu konatiĝis en la okcidento, kaj ankaŭ la eksterlanda filmaro, precipe tiu de Japanio, kun la filmoj de Kurasawa kaj aliaj japanaj reĝisoroj fariĝontaj dumvivaj plejŝatataĵoj al kiuj ŝi ade kaj ade reiris.

Norah kaj Harold kune aĉetis sian unuan domon en Brentwood dum la fruaj 60-aj jaroj – kun la helpo de la patrino de Harold. Ŝi estis vendinta sian propran domon en Brajtono kaj ŝi nordenvenis por estis pli proksima al Harold en Londono. Tiu dometo en Hammonds Lane estis la unua vere stabila hejmo kiun havis Norah post forlasi sian panjon kelkajn jarojn pli frue. Ili elektis lokon ekster centra Londono, sed sufiĉe proksima al la staciejo kaj facila loko de kiu oni povus pendolveturi. Pendolveturado estis tiam konstanta parto de ŝia labora vivo, kaj ankaŭ de tiu de Harold – ofte profitante de la tempo surtrajne per legi.

Ŝia filo Mark naskiĝis en 1963, kaj Norah ĉesis labori dum iom da tempo. Tiuj fruaj familiaj jaroj estis feliĉa tempo. Inter tiom multaj memoroj

Mark memoras ĉiusemajnajn ekskursojn al la naĝejo – ne facila vojaĝo buse kaj piede, kaj en ĉiuspecaj veteroj, sed kio donis al li daŭran ĝuon pri naĝado – kaj precipe pri naĝado en la maro ĉe Brajtono dumferie ĉe la patrino de Norah.

Kelkajn jarojn post la naskiĝo de Mark, Norah komencis fari kelkajn horojn da purigad-laboro por helpi finance, sed pli poste reiris al sekretaria laboro denove, finfine reirante al impostlaboro en Romford kaj poste en la urbego kiam Mark estis en la liceo. Ŝi ĉiam disponis pri praktikaj lertoj, kaj plezure ekzercadis siajn konsiderindajn kapablojn pri tajpado kaj stenografio.

Dum ĉi tempo ŝi lernis iom da germana lingvo ĉe vesperkursoj kaj pli poste kune kun Harold ŝi lernis Esperanto, kio fariĝis grava al la cetero de ŝia vivo.

Esperanto malfermis por ŝi vojaĝadon en orienta Eŭropo, precipe Pollando komence. Dum la sekvantaj jaroj ŝi komencis vojaĝi multe pli al eksterlando kaj trovis novan komunumon de amikoj trans la mondo.

Ŝi ofte vizitis la National Film Theatre sur la suda riverbordo de la Tamizo – tio estis regula familia ekskurso kaj estis io, kion ŝi daŭre faris sola post kiam ŝi emeritiĝis. Ŝia ĝuado de Londono kiel urbon esplorindan same daŭris – estis ie kie ŝi povis esti sola kaj sendependa, tamen ĉirkaŭita de homoj, kaj ŝi ŝatis la kosmopolitan etoson kiun havas Londono. Lokoj kiujn ŝi vizitis, iuj per Esperanto, iuj simple ferie inkluzivas Hungarion, Orientan kaj Okcidentan Germanion, Francion, Nederlandon, Grekion, Hispanion kaj Italion – kaj ŝi ĉiam ŝatis vere esplori lokojn kiujn ŝi vizitis. Ŝi ekiradis piede por vidi kion ŝi trovos.

Norah ŝatis paroli – ŝi facile povis fari kontakton kun homoj kaj ŝatis diskuti mondajn aferojn, lingvon, arton. Ŝi estis tre malferma pri siaj pensoj, ideoj kaj sentoj, kaj estis bonkora kaj afabla kunulo. Siajn proprajn problemojn ŝi ofte retenis al si, sed por aliaj homoj ŝi kapablis esti tre komprenema amiko, kaj ŝi ne estis juĝema.

Tio ne signifas, ke Norah ne povis kelkfoje esti obstina, kaj ankaŭ esprimi fortajn opiniojn, sed ŝi ĝuis debaton kaj emis aŭskulti kaj trakti kion diras la alia persono. Ŝia eco ne estis arbitre trudi siajn ideojn al aliaj – ŝi plene klarigis siajn kialojn.

Norah ne havis religian kredon. Harold interesiĝis pri okcidenta budhismo: ĝia ĝenerala etoso pri nenion malbonan fari, akcepti ke la vivo havas siajn malfacilaĵojn, sed sen emfazi ilin, kaj akcepti la naturajn fluon kaj ordon de aferoj ĉirkaŭ ni probable akordis kun la propraj sentoj de Norah mem. Norah ne estis ambicia persono, nek dogmema. Ŝi havis nenian superregantan strebon atingi grandiozajn celojn, sed ŝi posedis grandajn scivolemon kaj intereson pri la mondo ĉirkaŭe, kaj pri la homoj kun kiuj ŝi dividis ĝin.

Ŝi ĝuis la fizikan mondon ĉirkaŭ si – pejzaĝon, lumon kaj koloron – la relativan movon de preterirantaj aferoj kiam oni elrigardas el fervoja vagono kaj la pejzaĝo pasas. Dum multaj jaroj ŝi ne havis pezajn kurtenojn en sia dormoĉambro, por ke ŝi ĉiam vidu preter la ĉambron: la ĉielon, la montetojn ĉe la alia flanko de Brentwood, la birdojn. Ŝi ĝuis pentraĵojn, precipe tiujn kiuj elvokas la belecon de ĉiutagaj objektoj kaj scenoj. Norah aldone havis bonan sintenon rilate amuzadon. Ŝi ĝuis manĝi ekster la domo kaj provi ĉiajn manĝaĵojn de ĉirkaŭ la tuta mondo – precipe interesajn gustojn, ĉar mankis al ŝi flarsento. Ŝi ĝuis gajajn vestojn kaj desegnojn, kaj havis okulon por forta kaj eleganta dizajno en arto kaj en ĉiutagaj aferoj ĉirkaŭ si. Ŝi havis senton ankaŭ pri la surreala kaj la absurda – ŝi multfoje reiris al 'La Mastro kaj Margarita' de Bulgakov, ĝuis la viglecon kaj ludemon de la pentraĵoj de Dali, kaj la homecon de 'Under Milk Wood', kaj la radi-dramojn de Giles Cooper.

Ŝi subtenis plurajn organizojn kiaj CND [Kampanjo pri Nuklea Senarmiligo], New Internationalist kaj Greenpeace, opiniante ke jen estis unu malgranda maniero laŭ kiu ŝi povas kunagi pri la evidente grandaj problemoj de la mondo. Ŝi helpis liveri flufoliojn por Martin Bell kiam li kandidatiĝis por fariĝi loka parlamentano – ŝi havis naturan simpation kun honesta kaj sendependa ulo kiu provis plibonigi aferojn. Aldone ŝi estis avida aŭskultanto de Radio 4 kaj la World Service de la BBC – la radio estis konstanta kunulo por ŝi pli poste en la vivo kaj ankaŭ konstanta fonto de intereso. Eble ŝia pli frua vivo en Hindio donis al ŝi pli fortan senton pri aparteneco al pli vasta mondo.

Harold foriris por loĝi en Svedio mallonge post kiam li emeritiĝis, sed ili restis en kontakto kaj proksimaj – Harold revenis al Brentwood por vizitoj kiuj daŭris ĝis lia apopleksio en 2002, kiu lasis lin duone paralizita kaj senigita je parolkapablo, kaj faris komunikado preskaŭ nebla kiam li

reiris al Svedio. La apopleksio de Harold koincidis kun grava operacio por Norah rilate kanceron kaj tiam estis treege malfacila periodo por ŝi. Harold mortis du jarojn poste.

Kiam nova aŭ sekundara kancero konfirmiĝis en 2007 Norah decidis ne permesi pluan esploradon aŭ kuracadon kaj komunikis neerareble al sia kuracisto ke tiel estas ŝia deziro. Li respektis tion kaj faris sian eblon subteni al Norah dum la sekvantaj monatoj. Norah aliris sian finan malsanon kun vera kuraĝo. Ŝi plendis tiom malmulte, kaj petis helpon nur kiam ŝi vere ne kapablis sen ĝi – klopodante neniam ĝeni al iu ajn. La perdado de sia sendependeco ŝi trovis malfacila, precipe la neevitablan entrudiĝon de zorgantoj dum iuj semajnoj antaŭ ol ŝi devis forlasi sian domon – kvankam ŝi bone aprezis iliajn penojn kaj bonvolon. Kiam ŝi forlasis sian domon por eniri flegejon, ŝi speciale klopodis viziti siajn plej proksimajn najbarojn kaj poste neniam retrorigardis – sed tio certe ne estis facile por ŝi! Ŝi decidis translokiĝi por esti proksima al Mark en Rochdale por siaj lastaj monatoj – kaj ŝi trovis en la flegejon flegistojn kaj zorgistojn kiuj helpis al ŝi kun vera bonkoreco kaj digno kaj bone regis ŝian doloron – kion pleje antaŭtimigis ŝin.

Norah ĉiam altvaloris sian sanon – ŝi piediris ĉien kaj restis aktiva dum sia tuta vivo. Norah ĉiam klopodis fari sian plej bonan eblon por tiuj ĉirkaŭ ŝi kun sento de devo kaj forta kunsento por aliuloj. Kvankam malĝojigis al ŝi la multaj teruraj aferoj kiuj okazis kaj ankoraŭ okazas en la mondo, kaj ŝi spertis siajn proprajn zorgojn en la vivo, ŝi ĝuis ĝian belecon kaj variecon, neniam perdante senton de miro pri ĉio tia, kaj ŝi trovis verajn amikojn. La animo de Norah daŭre vivos en tiuj kiujn ŝi postlasas. Kaj en la aferoj kiuj Mark diros al ŝiaj genepoj Philippa kaj Max. Ŝi multe mankos al ni – iu speciala forpasis.

**Paul COSTELLO**

Norah estis tre amata ano de la Esperanto-komunumo – kaj tio evidentiĝis en la multaj esprimoj de kareco de post la 11a de aŭgusto. Du bildoj pri Norah emerĝas el tiuj mesaĝoj. Unuflanke, Norah estis persono kiu havis pasiaj konvinkojn, kiu malfacile akceptus 'pigra ortodoksemon'. "Rekta kaj defiema" estis la vortoj de unu amiko – kaj tio estis komplimento; tio estis kial li ŝin tiom ŝatis, kaj kial al li, kiel al ni ni ĉiuj, tiom mankos ŝiaj kontribuoj al la Esperanto-mondeto. La alia impresio kiu emerĝis el tiuj

mesaĝoj estis la zorgo de Norah pri la malfortaj, la timidaj, kaj la ofte-preteratentitaj homoj. Al Norah ne impresis grandiozuloj, famuloj, memgravuloj. Ŝi ja estis tamen tre konscia pri tiuj homoj kiuj sin retrotenas ĉe kunveniĝoj, eble pro sinĝenemo, malfido, aŭ simple pro ne bone scipovi Esperanton. Norah parolis al **ĉiu** kiel egalulo – kaj al reĝoj kaj al proletoj. Multo en tiu sinteno venis, mi suspektas, el ŝiaj fruaj jaroj in Hindio.

Ĉiu el ni havas apartan memoron pri Norah. En Skotlando, kie ŝi regule ĉeestis esperantajn kunveniĝojn, ni memoras kun aparta ŝato la ĉarman paroladon kiun ŝi faris ĉe nia kongreso en Peebles - 2004, mi kredas - pri ..... sia patrino! Ne, ne ia kompleksa lingvistika aŭ filozofia temo, sed pri ordinara homo, kiu, kiel rivelis Norah, posedis iajn eksterordinarajn ecojn. Norah argumentus, mi certas, ke **ĉiuj** homoj estas eksterordinaraj – se ni faras la klopodon konatiĝi kun ili.

Ŝajnas al mi taŭga aldoni kelkajn vortojn pri Esperanto, la lingvo kiu ludis tiom grandan rolon en la vivo de Norah. Laŭ mia kompreno, geamikoj, Norah ne estis verdire esperantisto, sed esperantano. Ŝi ofte insistis ke, por ŝi, Esperanto estas ne religio, nek ideologio, sed lingvo, komunikilo inter homoj el ĉiuj mondopartoj, ĉiuj rasoj kaj klasoj, ĉiuj tavoloj de kleriĝo. Per Esperanto Norah vojaĝis tra multaj landoj, renkontis multajn diversajn homojn. Por ŝi, tio pli gravis ol la propagando, la organizado - kvankam ŝi bone kontribuis al la londona klubo kaj kiel kasisto de EAB dum tre malfacila tempo.

Mi scias, ke mankos al ni ĉiuj Norah. Ŝi jam mankas. Tamen, ni ĉiuj havas niajn memorojn per kiuj ni povas ankoraŭ pensi pri ŝi. Por mi, antaŭ ĉio, pri tiuj vastampleksaj, viglaj konversacioj, ĉu en ŝia ĝardeno – ĝardeno kiu estis 100%-e kiel ŝi – aŭ kun la helpo de glaso, aŭ tri, da viskio, je la dua matene.

Adiaŭ, Norah, kaj dankon.

David KELSO

# Abonilo

## ESPERANTO-ASOCIO DE SKOTLANDO (EAS)

**Kotizo al EAS / abono al “Esperanto en Skotlando” por 2009:**

Dankon pro via ĝisnuna fidela subteno. La jarabono komenciĝas en januaro ĉiujare. Plene pagitaj membroj de EAS ricevas “Esperanto en Skotlando” kaj la “Scottish Esperanto Bulletin” senpage.

Sendu al: Membreca Sekretariino S-ino M. Casey, 9 Flora Gardens, Bishopbriggs, Glasgow, G64 1DS



**Elektu kaj indiku la kategorion**

Kotizo al EAS kaj senpage ricevo de la gazetoj	£7.50/€10
Ne-membro en Britio kiu abonas nur al EeS	£5/€6.50
Ne-membro en alia lando	£7.50/€10
Ekstra jarabono de <b>EeS</b> al la sama adreso	£4/€5

Donaco al Esperanto-Asocio de Skotlando

£/€

Totala sumo

£/€

Nomo .....

Adreso .....

Poŝtkodo .....

Telefono .....

Resendu ĉi tiun folion (aŭ kopion), kune kun via pago. Se pagante per £ pagu ĉeke al la adreso sube; ekzistantaj abonantoj kiuj ne havas adresŝanĝon povas simple sendi la ĉekon – ne necesas replenigi la formularon. Ĉekoj estas pagendaj al: “Scottish Esperanto Association”. Se pagante per €, vi povas pagi kontantan monon (ne ĉekojn) rekte al la adreso sube, aŭ alternative vi povas pagi en nian UEA-konton *eask-l* kaj sendi al ni la formularon, indikante ke vi jam pagis en nian UEA-konton. Bv. noti ke kvitancoj ne sendiĝos ĝis la sekvanta numero de Esperanto en Skotlando eldoniĝas.

# “Concise Encyclopedia of the Original Literature in Esperanto”

Recenzo

Mi ĵus aĉetis ekzempleron de ĉi tiu libro kompilita de Geoffrey Sutton. Ĝi estas vere monumenta verko konsistanta el 727 densaj paĝoj de informo pri la literatura trezoro de la esperanta lingvo. Oni ne povus tro laŭdi ĝin. Laŭdire la aŭtoro dediĉis sep jarojn al la kompilado, kaj la rezulto estas samtempe kompleta kaj konciza. Plie, la libro estas klare presita kaj forte bindita, kun luksa aspekto.

Tiom ofte, misinformitaj malestimigantoj de Esperanto asertas, ke ĝi estas artefarita lingvaĉo sen literaturo, kulturo aŭ komunumo. Ĉi tiu enciklopedio estas potenca argumento kontraŭ tiu miskoncepto, kaj ĝi sendube iĝos efika ilo por disvastigi scion pri nia lingvo.

Mi ricevis mian ekzempleron de la eldonistoj en Usono, kaj estis agrable surprizita pri la kosto, nome GBP £20.00. En ĉi tiuj malfacilaj tagoj, dudek pundoj ne estas bagatela sumo, sed por tiom granda kaj altkvalita libro, ĝi estas tre modera, precipe pro la fakto, ke la sendintoj postulis nenion por sendokostoj aŭ pakajo.

Mi entuziasmege rekomendas la verkon, ne nur al ĉiu esperantisto, sed ankaŭ al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la monda literaturo, al kiu apartenas la esperanta, kiel ĉi tiu libro abunde atestas kaj demonstros. Rezignu pri botelo da vino, granda skatolo da ĉokolado, aŭ vizito al matĉo aŭ koncerto, kaj aĉetu la Enciklopedion de Literaturo! Ĝi multe pli valoras.

***Sutton, Geoffrey: CONCISE ENCYCLOPEDIA OF THE ORIGINAL LITERATURE OF ESPERANTO, eldonita de Mondial, Nov-Jorko NY, ISBN: 978-1-59569-090-6. Obtenebla de EAB aŭ per la retaj liverantoj (Amazon, ktp).***

Garbhan MacAoidh (Girvan McKay)

# Poezia Angulo

Kie vi?

*“Wo bist du?” (1996) de Tamara DANZ (1952-1996),  
kantistino/lirikistino de la iame GDRa rokgrupo “Silly” (1978-).*

La tag' trudiĝis al nokta mort';  
La kolor' de l' katoj, sama sort'.  
Vizaĝon fenestre malvarmigas mi;  
Kie vi? Kie vi? Ne venis jam vi.

De l' strat' via rido kun alloga sorĉ';  
Mi tute ne volas, kaj ĵetas ĝin for.  
Lum' de l' kandelo tralarmas al mi;  
Kie vi? Kie vi? Ne venis jam vi.

Jen muŝ' droniĝas en vina turment';  
Helpkri' aŭdiĝas, kaj poste silent'.  
Mi ĝin rigardas, kaj tiu 'stas mi;  
Kie vi? Kie vi? Ne venis jam vi.

Post kiam vi venos mia kar',  
Lampo lumos por vi en la bar'.  
Staros aldone cianidamar'.  
Ĝin postvivos vi ne,  
ĝin postvivos vi ne.

La tag' trudiĝis al nokta mort';  
La belec' virina nun plia fort'.  
Mi ploras kaj ploras malamon al vi;  
Kie vi? Kie vi? Ne venis jam vi.  
Kie vi? Kie vi? Ne venis jam vi.

**El la germana: Ed ROBERTSON**



# Naciismo, internaciismo, sennaciismo

*Jen la teksto de prelego, kiun mi faris ĉe la septembra Studrondo en Dunblane. Ĝi estas reago al la debato en la paĝoj de ĉi tiu revuo rilate naciismo kaj nacia identeco. La diskuto kiu sekvis la prelegon estis certe interesa kaj plena je diversaj opinioj. Mi ne provos speguli tiujn opiniojn ĉi tie, sed se iu volas plu kontribui al la debato, mi certas ke nia Redaktoro bonvenigos pli da artikoloj! -- AW*

Kiam Hju Rid petis de mi fari prelegon ĉi tie en Dunblane, dum kiam ni ĉeestis la Universalan Kongreson en Roterdamo, mi konsentis post kelkaj pajntoj da biero, sed mi petis ke ĝi estu politika temo, ĉar mi ja estas tre politikema homo, kiel multaj el vi jam scias. Kaj post kelkaj pli da pajntoj da biero Hju konsentis, kaj nun mi faras ĝin. Nu ĉar ĝi estas politika prelego mi volis fari ĝin en politika maniero, kaj por mi la kerno de politiko, de politikumado, estas debato, diskutado, malkonsentado, demokratio. Do mi intencas fari aferon kiu nomiĝas almenaŭ en mia partio – t.e. la socialista partio, mi ne scias ĉu aliaj partioj havas ekvivalenton – ĝi nomiĝas “enkonduko”. Tio estas, mi ne tro longe enkondukos, prezentos la temon kaj miajn proprajn opiniojn ĉi-rilate. Kaj post kiam mi prelegis ni malfermos la diskuton al ĉiuj por debati kaj doni siajn opiniojn libere, se tio estas en ordo.

Mi menciis tiam ke mi estas en la socialista partio ĉar mi volas malferme kaj senhonte doni al vi fonon por kio sekvos, ĉar mi volas substreki ke mi ne estos neŭtrala en mia prelego; de mi vi ja aŭdos opiniojn socialistajn aŭ kvazaŭ-marksismajn pri mia elektita temo, kio estas “Naciismo, internaciismo, sennaciismo”. Mi elektis ĉi tiun temon ĉar ĝi ŝajnas al mi bona priskribo de debato kiu estiĝis lastatempe en la paĝoj de nia revuo *Esperanto en Skotlando*. Esperende vi ĉiuj atente kaj detale legis ĝisfine viajn ekzemplerojn de EeS; se jes, vi scios ke la debaton komencis David Kelso, kaj daŭrigis ĝin mistera, pseŭdonima aŭtoro “Internaciulo”; kaj plej lastatempe kontribuis Garbhan MacAoidh.

Nu, por tiuj el vi kiuj ne atenteme kaj detale legis viajn ekzemplerojn de EeS (kaj honton al vi se nel) mi resumos la debaton ĝis nun. David en sia unua artikolo donis sian argumenton rilate naciojn kaj naciismon. David esprimis konfuzon pri kial oni tiom rigardas naciojn kiel la fokuson por

malsamoj inter la homaro. Li prave diras ke, ekzemple, skoto de la altlanda regiono certe ne estas simila al skoto de la malaltlanda, sed ni konsideras ilin “ambaŭ skotoj”. Kial? Kio ligas ilin? Oni povus eble diri “lingvo”, sed tio kompreneble ne estas la tuta historio, ĉar skotoj kaj angloj (plejparte) parolas la saman lingvon, sed ili ne apartenas la saman nacion; kaj inverse, gaelo kaj malaltlandano, aŭ parolanto de la kimra kaj ne-parolanto de la kimra en Kimrujo, ja apartenas la saman nacion, eĉ se ili ne parolas la saman lingvon.

David finis per konsideri la naciecon esence falsan, aŭ almenaŭ, ne meritante la gravan apartan sintenon kiun oni donis al ĝi. Kaj li diras ke ni esperantistoj aparte agnosku tiun falsecon. Ni kompreneble ne konas tiujn lingvajn barojn inter nacioj. Kaj tion farante li referencas la penson de Lanti, kiu estis la fondinto de la politiko de “sennaciismo”, kaj ankaŭ de la neneŭtrala laborista esperantista organizo “Sennacieca Asocio Tutmonda”, SAT. Mi lastatempe, en Roterdamo fakte, trovis ĉi tiun libron “Manifesto de la Sennaciistoj”, verkita de Lanti, kiu koncize komunikas la filozofion de Lanti, kaj mi revenos al tiuj ideoj pli poste.

Respondis al tiu artikolo “Internaciulo”. Internaciulo ne kunsentis kun la sennaciismo de David, kaj proponis anstataŭe internaciismon. Internaciulo diras ke problemoj kun nacioj estiĝas nur se sentoj de nacia identeco estas direktataj kontraŭ aliaj nacioj. Kaj ke, kvankam nacieco ja estas politika demando – li konsentas ke ĝi estas “falsa” en tiu senco ke ĝi ne estas enkarna faceto de homo, malkiel sekso, haŭtkoloro, okulcoloro, seksuma orientiĝo, ktp – ĝi ne estas “falsa” ĉar oni povas vidi ke ĝi ja gravas en la mondo; li donas la ekzemplon ke oni ne povas feliĉe diri al irakano ke ne vere gravas ĉu oni estas irakano aŭ usonano. Ja certe gravas. Internaciulo ankaŭ malŝatas la ideon de Zamenhof ke la ĉefa kaŭzo de malamikeco inter la popoloj estas maleblo komuniki. Li indikas la masakrojn en Ruando kiel ekzemplo de malamo kaj genocido eĉ kiam du grupoj povas komuniki.

Garbhan Macaoidh skribis mallongan kontribuon plejparte konsentante kun Internaciulo, tamen defendante Zamenhof. Garbhan opiniis ke kvankam nun certe la plejparto de malamikeco venas de politikaj aŭ ekonomiaj kaŭzoj, en la tempo de Zamenhof kaj certe en la medio de Zamenhof, en Bjalistoko, estis alie, ĉar, Garbhan argumentis, la konfliktoj tie ne estis politikaj en la senco kiun celas Internaciulo, sed temis pri enkomunuma konflikto ene de parto de la rusa imperio, kie la caro havis absolutan politikan potencon.

Do jen la stato de la debato ĝis nun. Mi volas aldoni al ĝi. Unue mi konsideros ĉi tiun demandon pri “falseco”. Mi komprenas la argumenton ke nacieco ne estas kerna al iu homo, kaj neniu neas tion. Sed ja estas granda salto de tiu pozicio al nomi naciecon “falsa”. Ni konsideru aliajn facetojn de la homa fenomeno kiel ekzemple klaso. Ĉiuj – mi kredas – ĉiuj kredas ke klaso ekzistas. Oni havas malsamajn analizojn de kio precize ĝi estas aŭ kiel ĝi funkcias en hodiaŭa socio, estas marksisma analizo, liberala analizo, ktp ktp.; sed ĝi ekzistas. Ĝi estas socia fenomeno, ĝi emerĝas, ĝi elvenas de homa interrilatado. Same nacieco.

Do, laŭ mi, ni ne konsideru naciecon falsa. Ni prefere rigardu, kiel ankaŭ emfazis David, al kiu politiko fluas de la ŝajna graveco de nacioj. Ŝtatoj, registaroj, baziĝas sur nacioj. Naciismo estas la ĉefa ideologio en nia tempo. Kiam mi diras tion, per “naciismo” mi ne celas priskribi la politikon de sendependeco de ekzemple la Skota Nacia Partio; nek la malkaŝe rasisma politiko de ekzemple la Brita Nacia Partio. Mi volas preparoli la ĉiutagan preskaŭ senkonscian naciismon kiu ĉiam ĉirkaŭas nin. Kiam ofte vi aŭdis la frazon “la nacia intereso”? Tiun aŭ tiun registaran decidon oni pravigas ĉar ĝi estas “por la nacia intereso”. Kaj ĉi tie mi devas malkonsenti kun Internaciulo. Internaciulo diras ke oni povas distingi inter etna naciismo, kiu kondukas al rasismo kaj konflikto, kaj civita naciismo, kaj li diras ke la politiko de la skota sendependisma movado estas bazita sur tiu civita naciismo, ke ĉiu kiu loĝas en Skotlando (ekzemple) havas egalajn rajtojn civitanajn de skotlandano sendepende de etna origino.

Internaciulo aludas al la memidenteco de skotoj estante nerasisma, kaj li citas la sentencon *We're aw Jock Tamson's bairns*, ni ĉiuj estas la gefiloj de Ĝok Tamson, de Dio. Li kredas tion ne malbona apliko de nacia identeco.

Mi dirus du aferojn. Unue, kaj malpli grave, mi kredas ke Internaciulo fakte ne pravas. Oni konsideru la sperton de irlandaj enmigrintoj en la lastaj jarcentoj por konstati ke nerasisma mito estas ja tio – mito.

Sed due, mi dirus ke tuj kiam oni diras “Skotoj estas...” aŭ “En Skotlando ni...”, oni jam cedis al naciismo, senkonscie, ĉar oni pensas en stereotipoj. Oni neniam dirus “Blankhaŭtuloj estas...” aŭ “Laboristoj estas...” tiel aŭ tiel. Ni ĉiuj kiel homoj malsamas de unu la alia. Tie mi konsentas kun David, ke same kun la malkonsidero kiun ni ĉiuj nun kredas taŭge rilate rason, ni same malkonsideru naciecon. *Hom' tamen estas homo*.

Sed, oni eble demandas de si, kio estas la problemo ĉi tie? Mi ne jam faris argumenton kial naciismo estas malbona. Mallonge, ĝi estas malbona, ĉar ĝi estas metodo apartigi homojn kaj konvinki al homoj konkurenci kun unu la alia, kaj en krizaj tempoj, buĉi unu la alian. La mondmilitoj, aparte la unua sed certe ankaŭ la dua, estis kaŭzitaĵoj de naciismo. La britoj batalis kun la germanoj por “la nacia intereso” de ambaŭ landoj kaj milionoj mortis. Pro nenio. Pro tiu koncepto de “nacia intereso”, kiu certe ja estas falsa. Komprenoble la unua mondmilito ne estis en la intereso de “la nacioj” Britujo kaj Germanujo. Eĉ de la venkinta nacio, Britujo, milionoj da homoj mortis. Eble la militoj estas en la intereso de certa klaso de homoj, la regantaj klasoj, en la venkantaj nacioj. Sed nomi tiun intereso “la nacia” oni povas nur kiel “trompo”. Certe estis trompo por tiuj kiuj mortis.

Ĉi tion konstatis Lanti. Lanti lanĉis la sennaciistan movadon en la esperantista mondo. Lia tezo, kaj oni povas legi pri tio pli en *Manifesto de la sennaciistoj*, estis ke ĉar naciismo kondukas al buĉado, laboristoj ĉie en la mondo absolute rifuzi ne nur naciismon, sed nacioj mem. Ili rezignu pri la ideoj de nacia kulturo kaj ili rezignu pri la naciaj lingvoj. Laboristoj ĉie en la mondo parolu Esperanton ne kiel helplingvo, sed kiel unua lingvo, por forigi ĉiun spuron de naciisma pensmaniero.

Mi ne konsentas kun Lanti, sed mi povas kompreni kial li pensis tiel. Kie mi ne konsentas kun Lanti estas kiam li diras ke la estonta malapero de nacioj – ne naciismo, nacioj – kaj naciaj lingvoj, estas dezirinda. Mi kredas ke li absolute ne konsideris la rolon de la kulturo. Kulturoj ja aperas naciforme, ĉar grandaj partoj – ne ĉiom – de la kulturaĵoj estas verkataj en naciaj lingvoj. Tio estas fakto. Eble ĝi ne estas bona afero, sed ĝi estas fakto. Se ni vivos en la utopio de Lanti, ĉu oni devas rezigni pri literaturoj verkitaj en naciaj lingvoj? Aŭ ĉu ili eble devus esti kiel la latina, la helena kaj la sanskrita, literaturoj malfermaj nur al tiuj homoj kiuj studis “antikvajn lingvojn”. Mi kredas ke tio estas en si mem nesubteninda projekto.

Do por resumi, mi kredas ke kvankam nacioj kaj naciaj kulturoj ekzistas, kaj tiu ekzisto ne estas en si mem bona aŭ malbona afero, oni ĉiam devas skeptikeme pripensi la ideologiojn kiujn oni prezentas al ni, kaj mi kredas ke ĉian naciismon kiel politikan ideologion oni forĵetu kiel danĝera.

**Andreo WEIR**